MEGYEI KÖNYVTÁR
SZEGED TARJÁN

HUNGARA VIVO

3
1983
13,– Ft

NI ENTREPRENU KUNE!

Via kunlaboro estas nia forto
Vi planas, ni produktas

bubiv

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 3
(109)

ENHAVO

Parolas la Honora Komitato 82
D-ro Deme, L.: Pli ol nura revado 84
Dek teatraj vesperoj 86
Botos, I.: Gustumu la hungaran! 91
László, I.: Departemento Komárom 92
D-ro Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 9. 94
Aleksiev, N.: Misprezento de MEM 96
Illyés, Gy.: Ponto de Széchenyi (M. *Fejes*) 97
Fenyvesi, E.: Tra muzeoj de Budapeŝto 98
Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 103
D-ro László, F.: Ĉu ni vivos en amikeco kun la naturo? (E. *Fenyvesi*) 104
Csáth, G.: Murdo (L. *Mauksinszky*) 110
Bálint, Sz.: Kion diras la dekalogo? 112
Knĭchal, O.: JUNA AMIKO alparolas 113
Vukov, P.: Mirakla mondo de grotoj 114
Garai, G.: Mihály Dumitrás (I. *Szabó*) 115
Gaja paĝo 116
Leterkesto 118
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 119
Korespondi deziras 120

Sur la frontpaĝo: La placo Felszabadulás en la centro de Budapeŝto
(Foto de Zoltán *Fejér*)

Jen, nova fasko...

da opinioj pri Esperanto en la intervjuaro kun la membroj de la Honora Komitato, jam sur la sekvaj du paĝoj. La serioza apogo de pluraj gravaj sociaj agantoj ne malmulte kontribuas al la sukcesoj de la prosperanta laborado en Hungario.

Unu el la membroj de la Honora Komitato, lingvisto László *Deme* respondas la intervjuajn demandojn per aparta artikolo; la elstara hungara sciencisto pledas por la enkonduko de Esperanto en la internacian komunikadon.

Honora Prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado, Nikola *Aleksiev* sendis al ni diskutartikolon, en kiu li kritikas unu paragrafon de la verko «Celoj kaj politikoj en la Esperanto-Movado» de Renato *Corsetti* – Maŭro *La Torre*, aperinta en n-ro 5/1982 de HV. La kontribuaĵo de *Aleksiev* tamen ne limigas sin je la analizo de la diskutata aserto: la konata bulgara veterano de la Esperanto-movado koncize konigas ĉi tie la esencon de la agado de MEM, pruvante, ke la paco estas io nedividebla, ja en milito bomboj ne diferencigus katolikojn disde komunistoj...

Longa artikolo kun multaj fotoj raportas pri Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj, okazinta inter 18–27 de marto 1983 en Budapeŝto, enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo. Dum sinsekvaj dek tagoj okazis dek teatraj prezentadoj en Esperanto – signifa kontribuo al la internacilingva kulturo. La plimulto de la prezentitaj teatraĵoj estos spektebla ankaŭ dum la UK – nur oni ne forgesu frue antaŭmendi biletojn.

En la vico de la hungaraj regionoj nun oni povas konatiĝi kun Departemento Komárom, kies urboj agrable unuigas pasinton kaj nuntempon, kaj krome, ĝi situas proksime de Budapeŝto; sekve ĝiaj urboj povos servi kiel celoj de privataj ekskursoj dum la UK.

Unuavice estontajn kongresanojn interesos la artikolo de P. *Vukov* pri turismaj grotoj en Hungario; grotoj fakte ĉiam estis inter la ĉefaj turismaj allogaĵoj de nia lando. Ervin *Fenyvesi* prezentas la Budapeŝtajn muzeojn – verŝajne ankaŭ lia artikolo kaptos la atenton de tiuj legantoj, kiuj post kelka tempo estos gastoj de la hungara ĉefurbo.

«Hungara Antologio» aperis, kaj ĝi prezentas sur preskaŭ 500 grandformataj paĝoj specimenojn el sep jarcentoj de la hungara literaturo. En tiu ĉi numero lastfoje ni aperigas ĉerpaĵon el ĝi, ĉifoje la animkirlan novelon «Murdo» de Géza *Csáth*.

En tiu ĉi numero finiĝas la serio «Gustumu la hungaran!» de Imre *Botos*. Ĉu post la trifoja gustumado troviĝis iu, kiu ekhavis emon serioze eklerni ĝin? La Redakcio volonte ricevus informojn pri tio.

Oldřich *Knĭchal*, la nova redaktoro de la interlerneja revuo JUNA AMIKO informas pri la reviviĝo de tiu ĉi valora periodaĵo. Tio estas agrabla novaĵo ankaŭ por la redakcia stabo de HV, ja ĉiuj niaj legantoj, aŭtoroj kaj redaktoroj iam estis komencantoj...

Parolas la Honora Komitato...

En la pasintaj du numeroj de Hungara Vivo ni publikigis intervjuojn kun la membroj de la Honora Komitato. La tri demandoj direktitaj al ili, estis la jenaj:

1. Kiuj pensoj, sentoj vekiĝis en vi, kiam vi akceptis la inviton esti membro de la Honora Komitato?

2. UN deklaris la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. Ankaŭ la Universala Kongreso pritraktos la problemojn de la komunikado, kiel sian ĉeftemon. Vi estas ofta kaj aktiva partoprenanto de internaciaj rilatoj, ja tion postulas viaj profesio kaj ofico. Kiel vi pritaksas la komunikajn kaj ĉefe lingvajn malfacilaĵojn en tiuj rilatoj?

3. Ĉu vi vidas iun elirvojon, kiel eblus, pli ol ĝis nun, moderigi aŭ solvi la multfacetajn lingvajn malfacilaĵojn en la internacia komunikado?

*

András Korcsog ŝtatsekretario de Ministerio pri Klerigo

1. Mia membreco en la Honora Komitato estas plie oficiala ol persona, do, tio signifas la subtenan partoprenon de la Ministerio pri Klerigo en la laboroj de la kongreso. La personan inviton mi akceptis ĝoje, ĉar temas pri internacia renkontiĝo de humanisma monda movado, pri kies ĉefceloj ankaŭ mi mem konsentas.

Nia fako regule renkontas la strebadojn de la movado, kiu havas gravajn kulturpolitikajn celojn ĉefe en du direktoj: kiel *lingvoinstruado* evoluigon de kapabloj en la instrua-eduka kampo, kiel *kolektiv-krea movado* eblon ekkoni kaj interŝanĝi la kulturajn valorojn enkadre de la ĝenerala popolkleriĝo.

En nia lando oni povas la internacian lingvon alproprigi en ĉiuj instruaj niveloj. Krom la ĝeneralaj aplikantoj de la lingvo plimultiĝas jam ankaŭ ĝia uzado por fakaj celoj: medicino, komputado, turismo, sporto. Pli kaj pli gravan rolon havas ankaŭ la internacilingva libroeldonado. Ni partoprenas ankaŭ en la internaciaj pedagogiaj eksperimentoj, celantaj malkovri instruajn-edukajn eblojn de Esperanto.

2. Ekkoni kaj kompreni la esencajn trajtojn de malsamaj kulturoj, malkovri kaj reciproke utiligi trajtojn de vivmaniero estas tiaj noetikaj problemoj, kie tuj aperas malfacilaĵoj en la kompreno de la signosistemo, de la lingvo. La diskonigon de la kulturajsciencaj informoj malfaciligas, ke la transprenantoj devas oferi siajn proprajn spiritajn fortojn por ellerni la perantajn lingvojn. La evoluigo de la politikaj, ekonomiaj, sciencaj kaj kulturaj kontaktoj premisas eviti la lingvajn barojn – nuntempe per altnivela kaj multekosta interpretado. Tamen okazas paneoj, do estas tre alloge realigi pli multflankan, senperan komunikadon. Priatenti la evoluon kaj helpi la aplikadon de la internacia lingvo estas motivite, ĉar ĝi celas plifortigi la interpopolajn kontaktojn, sekve ĝi servas la tuthomaran futuron.

3. Ni devas alfronti ne nur la lingvajn problemojn kaj la eventualajn iluziojn, sed ankaŭ la manipuladon, kiu intencas malhelpi la universalan solvon. Estas vere, ke la internacia helplingvo neniel minacas la naciajn lingvojn, ĝi eĉ malfermas por ili eblon ekzisti kaj evolui sen minacoj de imperiisma atako, sed estas vere, ke la tradiciaj privilegioj de iuj lingvoj malaperus.

Estus konvene denove fari malkovron kaj resumadon en monda skalo pri la nuna enhavo kaj realeco de la varianto solvi la problemojn pere de Esperanto. Al tio servas bonajn analogiojn la tria sesio de la Ligo de Nacioj en 1922. Nun ni devus prezenti la lingvajn problemojn de la internaciaj kontaktoj, la aferon de la internacia lingvo al UN, kaj por tio eĉ ekzistas eblo, se la socialismaj kaj la nealiancitaj landoj povus trovi manieron amplekse priesplori la lingvan politikon en la internaciaj kontaktoj, kaj se ili povus konsenti pri la solvo.

La temelekto de la Budapeŝta UK estas el tiu vidpunkto centprocente eminenta.

*

D-rino Gyuláné Szentistványi, sekretario de Tutlanda Prezidio de Patriota Popolfronto

1. Mi akceptis ĝoje tiun ĉi honorigan taskon. Kaj tion mi faris por du kialoj: mi centprocente akceptas la celojn de la kongreso kaj la Patriota Popolfronto kompreneme subtenas Esperanto-movadon, kiu helpas per sia kultura agado la internacian kompreniĝon, la pacon kaj ankaŭ la nacian unuecon de nia popolo. La popolfrontaj komitatoj kadre de sia agado volonte subtenas la lokajn grupojn de la esperantistoj.

2. Mi opinias, ke tiu ĉi problemo – bedaŭrinde – ankoraŭ longe estos nesolvita demando de la homaro. Nun, kiam la sciencoj kaj tekniko tiom rapidege evoluas kaj la politiko prezentas por la popoloj nekompreneblajn turniĝojn, necesegas por ĉiuj homoj rapide alproprigebla perilo, kiu helpus krei senperajn homajn kontaktojn inter sciencistoj, artistoj, diversaj fakuloj, inter ĉiuj bonvolemaj homoj, inter la gefiloj de ĉiuj nacioj.

Dirante: internacia komunikado, mi pensas ne nur pri la grandaj novaĵagentejoj, telegrafagentejoj, gazetaro, radio, televidilo, pri iliaj rapidaj kaj fidelaj servoj, sed ankaŭ pri tio: kiel eblus solvi la paroladon inter diverslingvaj homoj, realigi la senperajn kontaktojn, la diskutadon pri la tute ĉiutagaj homaj aferoj. Mi kredas, de la vortkompreno ĝis la reciproka kompreniĝo kondukus jam tute bone irebla vojo.

3. Iam plimulto de la progresemaj homoj imagis, ke Esperanto solvas la lingvajn malfacilaĵojn. Tiuj iluzioj prosperis ĉefe komence de la jarcento, la bazo estis la rapida disvolviĝo de la

movado. Ili povis plenrajte iluzii, ĉar Esperanto volas anstataŭigi neniun nacian lingvon, sed apud la zorgema flegado de la gepatra lingvo, ĝi povas esti facile akirebla rimedo en la internacia komuniko.

Depost tiu tempo Esperanto multe evoluis, kaj ĝi estas por tiu rolo hodiaŭ jam pli taŭga. Sed por realigi la revon de Zamenhof, ni devas venki ankoraŭ multe da baroj. Sed estas certe, ke la ekzisto, la disvastiĝo de la movado estas strikte kunligita kun la konservado de la paco kaj socia evoluo. Nur tiel eblas realigi, ke Esperanto fariĝu vere tutmonda lingvo.

*

Illés Tóth, ĝenerala direktoro de Hungara Poŝto, prezidanto de Hungara Nacia Komitato de Monda Komunika Jaro

1. La poŝto servas jam ekde jarcentoj la pacajn kontaktojn inter homoj kaj popoloj. Kiel gvidanto de Hungara Poŝto, mi akceptis esti membro de la Honora Komitato por esprimi la konvinkiĝon de 67 mil hungaraj poŝtistoj: estas nepre bezonata tiu mondskale disvolviĝanta formo de la pli bona interhoma kompreno kaj de la sukcesa kontaktiĝo, por kiu luktas la internacia Esperanto-movado.

2. UN deklaris la jaron 1983 Monda Komunika Jaro kaj alvokis pere de la internaciaj fakaj organizoj: Universala Poŝta Unuiĝo (UPU) kaj Internacia Telegrafa Unuiĝo (UIT-ITU), la landajn direkciojn de la poŝto por organizi kaj kunordigi la lokajn eventojn de la Jaro. UN rekomendas al ĉiuj landoj, ke ili esploru siajn proprajn staton de telekomunikado, politikon por ĝin evoluigi, kaj ili faru ĉion eblan por evoluigi en pli rapida ritmo la telekomunikadan infrastrukturon.

La Hungara Poŝto havas aron da aranĝoj: kune kun multaj enlandaj instancoj interesitaj pri la telekomunikado ĝi alvokas la atenton de la ŝtatestroj kaj ŝtatanoj pri la komuniko de novaĵoj, kiel pri la plej grava, multflanka formo de la interhoma komuniko.

En la Hungara Nacia Komitato de Monda Komunika Jaro partoprenas krom Hungara Socialisma Laborista Partio, Komunista Junulara Asocio, ministerioj, ĉefinstancoj, altlernejoj, ankaŭ reprezentantoj de la sociaj organizoj, D-ro Ottó Haszpra, vicprezidanto de HEA ĝin partoprenas same, kiel mi la Honoran Komitaton de UK.

Estas por ni aparte ĝojige, ke kadre de la Jaro kunsidos en Budapeŝto la Universala Kongreso de Esperanto, kiun vizitos kiel honora gasto, s-ro Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de la Internacia Telekomunika Unuiĝo, ĉefa kunordiganto de la Monda Komunika Jaro. Estas ĝojo por ni, ke UK pritraktos komunikajn problemojn, ties realigajn formojn. En la kongresejo, en Budapeŝta Sporthalo estos prezentataj telekomunikiloj kadre de komunikoteknika ekspozicio.

Mi opinias, ke estas jam tempo por fari paŝojn kaj enlande kaj internacie al la solvo de la lingvaj malfacilaĵoj en la internacia komuniko pere de la alproprigo, uzado de la internacia lingvo.

Same kiel la poŝtaj kaj telegrafaj instancoj de diversaj landoj en la tria kvarono de la pasinta jarcento povis fari komunajn paŝojn por forigi la barojn en la internacia telekomuniko, ni esperas plenrajte, ke rezulte de persista laboro de la internacia Esperanto-movado estos transpotenblaj ankaŭ la lingvaj baroj en la internaciaj kontaktoj.

*

D-ro János Tóth, ĉefsekretario de Federacio de Teknikaj kaj Natursciencaj Societoj

1. Mi ĝoje entreprenis partopreni la laboron de la Honora Komitato. La kongresa ĉeftemo „Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" kune kun siaj zorgoj, ankoraŭ nesolvitaj demandoj ekstreme koncernas ankaŭ nin, kiuj laboras sur sciencaj kaj teknikaj terenoj. Ni tre ŝatus se tiuj demandoj estus entrafe respondataj. Sed kune kun ni. Ni entreprenas taskojn en tiu laboro, ja ne estas imagebla nia klerigo kaj pluklerigo, nia tuta teknika-scienca evoluo sen la rapida kaj relative simpla informfluo.

2. La teknika, eĉ la scienca intelektularo ne parolas fremdajn lingvojn, aŭ se jes, la scio de du-tri fremdaj lingvoj ne certigas por ili la ampleksan kaj rapidan fakan superrigardon, la eblon apliki la plej novajn rezultojn. Estus necese, ke la fakuloj parolu krom la angla, rusa, germana, japana, franca ankaŭ la nederlandan, slovakan, kroatan, ukrainan, serban lingvojn. Sed tio estas neebla. Kaj la tradukaĵoj, kiel sciate, estas malglataj kaj havas multe da ebloj erari. La interpretisto devas paroli la koncernan lingvon en la nivelo de gepatra lingvo, kaj samtempe li devas koni profunde ankaŭ la fakan kampon. Ankaŭ en la alia direkto estas simila la situacio: la hungaran parolas 16-18 milionoj da personoj. Nia teknika intelektularo kreas eminentajn spiritajn valorojn, sed ties eksterlanda aplikado havas lingvajn barojn. La rezultojn publikigitajn nur hungare estas malfacile vendi. Kaj la cirklo fermiĝis.

3. Lingvo parolata paralele kun la gepatra certe multe helpus solvi la ĵus skizitajn zorgojn. Iam la latina estis la lingvo de sciencoj, ties rolon nun povus transpreni Esperanto. Mi scias pri la brilaj rezultoj de la beletristiko, sed sur la teknika-scienca kampo ankoraŭ ne ekzistas tiaj sukcesoj. Estus utile, se Hungara Esperanto-Asocio kaj Federacio de Teknikaj kaj Natursciencaj Societoj fondus komunan lingvan komitaton por ellabori la enlandajn kondiĉojn de teknika-scienca aplikado de Esperanto, por certigi eblojn de publikado, eldonado.

Imre *Szenes*

D-ro László Deme

Pli ol nura revado



La verkinto de tiu ĉi artikolo estas unu el la gvidaj lingvistoj en Hungario. Li aktive subtenas la aferon de la internacia lingvo sur ĉiuj forumoj; por esprimi sian engaĝitecon al Esperanto, li akceptis esti honora prezidanto de HEA, kaj nun, antaŭ la kongreso, li volonte fariĝis membro de la Honora Komitato. Laŭ la demandoj starigitaj por la Honora Komitato, li verkis tiel ampleksan artikolon, kiu inter la lingvistoj nepre povas havi signifan influon por la reala pritakso de Esperanto. Ni esperas, ke niaj kolegoj pretos traduki lian artikolon en diversajn naciajn lingvojn por ankaŭ tiel pligrandigi ĝian efikon.

Du vizaĝoj de la gepatraj lingvoj

Jam la kvinan jardekon mi okupiĝas pri lingvoj, lingvistiko. Same kiel mia tuta generacio, ankaŭ mi mem komencis la laboron ĉe lingvohistoriaj studoj, poste tra la esplorado de la lingvaj dialektoj mi alvenis ĝis la publika kaj literatura lingvo. Tiu vojo kondukis min samtempe de la pasinto ĝis la nuntempo, de la lingvo ĝis la homo uzanta lingvon, de la parolanta kaj skribanta individuo ĝis la socio formanta kaj uzanta la lingvon kaj la skribon. Antaŭ dek tri jaroj, en la inaŭgura studo de la festa semajno de la hungara lingvo mi trarigardis nedisigeblan kunplektiĝon de la socia lingvo kaj lingva socio, sub la titolo: „Jarmilo da lukto por evoluigi nian gepatran lingvon." La sekva jaro estis dediĉita jam al la rigardo en la futuron: analiza mezurado, kiel evoluos „Lingvo kaj lingvistiko en la sciencateknika revolucio."

La duvizaĝeco de la gepatraj lingvoj evidentiĝis por mi en la prilaboro de la ĵusa temo. Nome tio, ke ili levas la individuon ĝis la nivelo de la lingva socio, sed tie jam malebligas por li pluan evoluon. Kaj ne estis malfacile konvinkiĝi: la amasa instruado-lernado de fremdaj lingvoj, sed eĉ interpreti permaŝine ne estas pli, nur trudsolvo kun provizora valoro. La vera, perspektiva respondo estas: ĝenerala uzo de unu komuna dua lingvo. Sed por tiu rolo konvenas neniu el la „naturaj", naciaj lingvoj. Nek pro tio, ĉar en ili ĉiuj multas eventualaĵoj, balastoj sedimentiĝintaj dum la spontanea historia evoluo; nek pro tio, ĉar ĉiu lingvo apartenas al „iu", sekve, sen maljustaj avantaĝoj, ili ne povas aparteni al „ĉiu". Kiel sola solvo proponis sin nur la konscie konstruita, „artefarita", kvankam tute ne kontraŭnatura formo kolektanta ĉiujn avantaĝajn trajtojn kaj ekskludanta ĉiujn malavantaĝojn de la naturaj lingvoj, kiu povas esti ĉies, ĉar ĝi estas nenies, kaj pro tio, ĉar ĝi enhavas la komunan el la specifaĵoj.

Tiel mia vojo estis inversa al tiu de multaj aliaj: ne por la lingvo (kiun tiutempe mi ankoraŭ ne konis) mi komencis serĉi lokon kaj rolon, sed al rolo, pruviĝinta el komunikteoria vidpunkto nepre necesa, mi serĉis konvenan lingvon. Tial mi entreprenis membrecon en la redakcio de „Világ és Nyelv" (Mondo kaj lingvo), tial mi akceptis ankaŭ nun esti membro de la Honora Komitato.

Inter miaj lingvistoj-kolegoj bedaŭrinde malmultas, kiuj Esperanton rigardus lingvo, povanta fariĝi eĉ „monda lingvo". Ili argumentas: ĝi formiĝis ne laŭ la natura vojo, kaj ĝi ne havas socion. Kvankam vere: ĝi estas konscie kreita verko. Sed la bazo por tiu verko estis la naturaj homaj lingvoj. Kaj vere: ĝi ne havas mikrosocion. Sed tie estas por ĝi en la fono, kun sia historie akumuliĝinta nocio- kaj penso-mondo, la „makrosocio": la homaro mem.

Decas citi eksterlandajn fakulojn

Ĝis kiu grado levas, kaj kie baras la gepatra lingvo – tion spertas ankaŭ mi ĉe mi, ĉe ni mem. Eble sur pli ol unusola tereno ni verkis valorojn, kiujn primirus la mondo – se ĝi konus ilin. Sed ni verkis ilin hungare. Kaj ekspliki pensojn en fremda lingvo: tio estas ekvacio kun du nekonataj kvantoj; kun la novaj pensoj oni devas ja lukti eĉ en sia gepatra lingvo. Ankaŭ la tradukado ne estas solvo: la tradukisto devus esti kunverkanto sur nocia-pensa nivelo; li devus uzi tiajn nociojn, interpreti tiajn pensojn, kiuj en la koncerna lingvo neniam antaŭe estis esprimitaj. Sekve la sciencaj rezultoj de la malgrandaj popoloj restas en multaj kazoj nekonataj; eĉ al niaj propraj sciencistoj decos citi eksterlandajn fakulojn post dek-dudek jaroj, kaj eble tiuj citaĵoj enhavos la samon, kion enlandanoj jam pli frue, kaj eĉ pli bone, eksplikis.

Ankaŭ mi mem estas membro de kelkaj internaciaj fakaj asocioj. Ek-

zemple mi estas membro de internacia redakcio de *Atlas Linguarum Europae* (Atlaso de Lingvoj en Eŭropo). La laboro, la korespondado, la ĉiujare aranĝitaj plurtagaj kunsidoj – ĉiu-ĉiu okazas angle-germane-france. La membroj, kiuj uzas sian gepatran lingvon, havas nemezureble enormajn avantaĝojn; ili diras ĉiam tion, kion ili pensas. La ceteraj tion, kion ili povas diri el siaj pensoj en la lingvo uzata de la partnero, kiu estas jen anglo, jen germano, jen franco; kaj estas por ni avantaĝe, se li estas nederlandano, greko aŭ albano, ĉar en tiu kazo ni ambaŭ estas same en malavantaĝa situacio.

Kvankam tie ĉiuj dek-kelkaj membroj estas prestiĝaj lingvistoj, kaj ili laboras ĝuste pri la atlaso de Eŭropaj lingvoj.

Rompi la magian cirklon

Mi opinias utiligebla evento, granda eblo ankaŭ la Mondan Komunikan Jaron, kaj la 68-an UK por paroli pri la multfacetaj lingvaj malfacilaĵoj, problemoj. Sed multe pli taŭgus, se ni povus ion konkretan fari kontraŭ tiuj. Nia gazetaro sciigas ĉiam pri novaj kampanjoj, kiuj celas la samon: vastigi la aplikan rondon de la ĝenerala kaj komune dua lingvo. Sciencaj asocioj, turismaj organizoj, kooperativaj movadoj postulas: ni paŝu jam antaŭen!

Ni devus rompi jam foje per komunaj fortoj tiun magian cirklon, en kiu la afero, jam sesdek jarojn, turniĝadas ĉie en la mondo. Jam komence de la 1920-aj jaroj estis prezentita al la Ligo de Nacioj, antaŭulo de UN, la komuna propono de 14 membroŝtatoj pri la mondskala akcepto, ĝenerala instruado de ĝenerale dua lingvo – konkrete de Esperanto. La bone konataj kaj ŝajne ne forigeblaj kaŭzoj, kiuj rompis la tiaman elanon, estis:

a/ la „grandaj" nacioj, kies lingvoj estas jam „mondlingvoj", ne spertas la neceson ellerni alian lingvon, kaj ili ne volas malhavi la lingvajn avantaĝojn; *b/* la aliaj popoloj kial instruu kaj lernu lingvon, kiu (ankoraŭ) ne estas ĝenerale uzata; *c/* sed kiel fariĝu ĝenerala ĝia uzado, se ne disvastiĝas ĝia instruado-lernado; kaj verdire eĉ la instruistoj malsufiĉas.

Sed esperige fortiĝas en la mondo la opinio: se la „grandaj" ne spertas la krizon de la internacia komunikado, tiukaze la afero estu komencita ne ĉe ili. Nuntempe UEA tre ĝuste orientiĝas al la tria mondo kaj nealiancitaj landoj. La plimulto de la evolulandoj – iamaj kolonioj – estas plurlingva. Dispartiĝi en etajn naciajn-etnajn lingvojn estas maleble ankaŭ pro praktikaj kialoj. Do, por la plimulto restas nur la jena alternativo: subpremi per iu enlanda lingvo la aliajn enlandajn, aŭ elekti iun eksteran – por ĉiu fremdan – lingvon por komuna „nacia" lambastono. Sed per tio fariĝas premiso de la amasa socia leviĝo la scio de la koncerna fremda lingvo, tiu de la iamaj koloniistoj. Kaj la uzado de la angla aŭ franca lingvoj disvastigas la anglan, respektive la francan manieron, enhavon, tradicion de la pensmaniero, mondkoncepto, eĉ de la kulturo: la fremda nacia lingvo fremdigas ĉiun popolon disde si mem.

En la multlingvaj evolulandoj por transporti la internajn lingvajn problemojn kaj samtempe konservi kaj evoluigi la nacian identecon povus plej celkonvene servi la neŭtrala kaj komuna dua lingvo. Sed plie helpus iliajn eksterajn kontaktojn, se tiu interna „helplingvo" estus la sama en ĉiuj landoj, kiuj kunligus kaj ne diserigus ilin tiel, ke la diversaj dualingvuloj (anglaj, francaj, hispanaj, nederlandaj ktp.) por kompreni unu la alian devas alproprigi pliajn fremdajn lingvojn. – Tiun klopodon ankaŭ la socialisma ŝtataro devus forte subteni; eble per tio, ke ankaŭ ili elektus la saman lingvon komuna rimedo en la kontaktoj kun tiuj landoj kaj ankaŭ inter si (ekzemple en la komerco, industrio, tekniko).

La problemo kaŭzita de la kontraŭstaro flanke de la „grandaj" nacioj tiel estus evitebla. Sed kiel solvi la kontraŭdiron inter la „enkonduko" kaj malmulta instruado de Esperanto? Estas ja vere: neniu elektas volonte sia dua lingvo tiun, kiu ne estas sufiĉe multe parolata; kaj kial lerni lingvon, kiu ankoraŭ ne havas praktikan prestiĝon. – Tie povas helpi evidente la plurŝtupa solvo. Se – ni diru – la nealiancita ŝtataro (aŭ ene de ĝi la evolulandaro), en siaj kadroj (aŭ eventuale jam tuj kun la KEI-landoj) strategie kontraktas, ke (nur por ekzemplo, aŭ tamen pli) ili enkondukos Esperanton laŭgrade inter 1992 kaj 2000 kiel oficialan, sed minimume preferatan lingvon de la reciprokaj kontaktoj. Tiukaze tuj ekzistus senpera celo kaj perspektiva senco por la vastiĝo de la instruistaro, kaj pere de ĝi la amasiĝo de la lernantaro; kaj samtempe ekzistus sufiĉe da tempo por laŭgrade krei la lingvosciajn kondiĉojn.

La instruado de Esperanto kiel unua fremda lingvo evidente ne intencas anstataŭigi la instruadon de la ceteraj lingvoj, nur prepari tion. Jam ekzistas spertoj, kiom valoras tiu rolo de Esperanto: la instruado de la rusa pruviĝis pli rezultohava en la klasoj, kie tion antaŭis Esperanto-kurso. Sed ankaŭ en la landoj, kie ne estus instruata dua fremda lingvo, ankaŭ tie ekhavus vastaj amasoj unu, kiu estas facile ellernebla, kaj kiu ne estas „valuto" de fremda nacio, sed „internacia kupono". – Kaj kion povus fari la „mondlingva ŝtataro" unuflanke, kaj la oficiala tutmonda organizo de la nacioj aliflanke? Ĉiuj devus rigardi Esperanton „lingvo", eĉ unu el la mondlingvoj. Kiu estas aldone konvena ne nur por la kontaktoj kun la „malgrandaj" kaj „evoluaj", sed ankaŭ por la rilatoj inter la „mondlingvanoj"...

En la mil naŭcent okdek tria jaro, kiam UN elektis temo por sia Monda Jaro la internaciajn kontaktojn, la interŝanĝon de informoj, la egalrajtecon kaj demokration de la informfluo, la rompon de la informmonopolioj, kiuj prezentas politikajn fortojn, kaj ankaŭ UEA analizas la realigon de la senpera komunikado, kaj el teknika kaj el socia vidpunktoj, – en tiu ĉi jaro eble povas esti pli ol nura revado, ke *almenaŭ* parto de la homaro *almenaŭ* en tiu demando *almenaŭ* unusolan paŝon povos fari antaŭen.

DEK TEATRAJ VESPEROJ

Inter la 18-a kaj 27-a de marto ĉijare la Esperanta teatra arto duafoje havis sian feston en Budapeŝto. La organizantoj de Budapeŝta Printempa Festivalo – antaŭ ĉio Hungara Nacia Turisma Oficejo – decidis inkluzivi en la programo Internacian Renkontiĝon de Esperanto-Teatroj. Nacia Turisma Oficejo ĉ. 90 procente kovris la kostojn de la aranĝo (la reston pagis Hungara Esperanto-Asocio), kaj en amaso da hungarlingvaj kaj fremdlingvaj reklamfolioj, programkajeroj, ktp. aperis la detala programo de la Esperantaj teatraj prezentadoj, kun informa artikolo pri la Esperanta teatro. Kontentiga estis la eĥo en la hungaraj amaskomunikiloj: la televidĵurnalo dufoje raportis pri la Esperantaj teatraj eventoj, estis dissenditaj almenaŭ ses radiointervjuoj, kaj aperis ĉirkaŭ deko da artikoloj en diversaj gazetoj, interalie ankaŭ en la centra tagĵurnalo de Hungara Socialisma Laborista Partio, en „Népszabadság" (Popollibero).

Malfermo de la Renkontiĝo: Péter András Rados, Ildikó Pécsi kaj d-ro Endre Baráth

Teatro „Miklós Radnóti" – kun Esperanta flago

La prezentadoj ankaŭ ĉijare okazis en Teatro „Radnóti", kies aktoroj grandnombre eklernis la lingvon, ĉekape kun la direktoro Emil *Keres,* mem renoma aktoro, kaj gvida aktorino de la teatro Ildikó *Pécsi.*

Eksterlandaj aŭtoroj

En la unua vespero – la 18-an de marto – estis prezentitaj du teatraĵoj: la monodramo de Samuel *Beckett: La lasta magnetofonbendo de Krapp,* en la plenumo de Kálmán *Szabó.* La Nobel-premiita aŭtoro priskribas en ĝi vivon malsukcesintan, senesperan, kiu kvazaŭ ŝokis la publikon. La alia teatraĵo estis etikedita „poezia vizio" – ĝi estis elektaĵo el „La antologio de Spoon-river" de Edgar Lee *Masters,* kaj havis la titolon *La mortintoj de Spoon-river.* La publiko povis vidi reviviĝon de mortintoj en tombejo, kaj ĉiu rakontis pri siaj vivo kaj morto per orelravaj versoj. Elstaraj hungaraj geaktoroj personigis la reviviĝintajn figu-

rojn: Kossuth-premiitoj Kati *Berek* kaj Emil *Keres,* merita aktorino Ildikó *Pécsi,* krome Denise *Kárpáti,* Zsigmond *Fülöp* kaj István *Wohlmuth.* Reĝisoro estis Kálmán *Szabó.* Ambaŭ teatraĵoj estis tradukitaj de Jozefo *Horváth.* Antaŭ la prezentado aktorino Ildikó *Pécsi* laŭtlegis la saluton de la vickritiko ĝi ne trovis favoran akcepton. Ildikó *Pécsi,* Emil *Keres,* Józsa *Hacser,* Lajos *Tándor,* Csilla *Herceg,* István *Wohlmuth* (anstataŭ la pasintjare rolinta Levente *Moravetz*), Denise *Kárpáti,* Zsigmond *Fülöp* kaj Rikardo *Horváth* donacis du agrablajn horojn al la publiko.



Kálmán Szabó en „La lasta magnetofonbendo de Krapp"

prezidanto de UEA Baldur *Ragnarsson,* kaj salutojn de diversaj movadaj kaj kulturaj instancoj, interalie tiun de „Krizalido". La Renkontiĝon malfermis d-ro Endre *Baráth,* ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio, sekretario de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento. La du teatraĵoj estis ripetitaj la 24-an de marto, kun la sama sukceso, kiun havis la premiera prezentado.

Profeto denove

Dum la ĉijara Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj dufoje – la 19-an kaj 25-an de marto – estis prezentita la teatraĵo de János *Elem: Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?* Ĝi – kiel en la pasintaj kvin prezentadoj (tri en Budapeŝto, du en Antverpeno) – sukcesis bone amuzi la publikon, malgraŭ tio, ke ĉe la Esperanta teatra

Italaj – bulgaraj „Rozoj"

La 21-an de marto trupo de bulgaraj aktoroj prezentis la triaktan amuzan komedion de la itala verkisto Aldo de *Benedetti: Rozoj.* La leĝeran temon la aŭtoro priverkis tre bone, kreante plurajn situaciojn, kiujn la spertaj bulgaraj geaktoroj sukcesis adekvate ekspluati, ne unufoje ridigante la publikon. La ludo de Belka *Beleva,* Anani *Anev,* Angelina *Sotirova* kaj Mihail *Ĉobanov* rikoltis ĝeneralan plaĉon. La teatraĵo estis sukcese ripetita la 27-an de marto, en la lasta tago de la programaro.

Petőfi sur scenejo

La 20-an kaj 22-an de marto prezentis la aktorino Gabi *Jobba* sian unuhoran recitalon el verkoj de kaj pri Petőfi. Jam pasintjare ŝi rikoltis grandan sukceson antaŭ la esperantista publiko en la teatraĵo de B. *Vasiljev: La aŭroroj ĉi tie estas silentaj.* Nun la sukceso ripetiĝis: kun verva forto ŝi sukcesis rekrei la ĉiam veraman, puran kaj batalpretan personecon de la granda hungara poeto. Ĝi estis impresa travivaĵo ne nur por hungaroj, kiuj ĉiuj

„La mortintoj de Spoon-river": Ildikó Pécsi, Kati Berek kaj Emil Keres

„Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto?" – Józsa Hacser, Denise Kárpáti, István Wohlmuth kaj Lajos Tándor

intime konas la prezentitajn poemojn, per la recitalo de *Jobba* la eksterlandaj spektantoj povis penetri en la profundojn de la hungara animo, pli bone kompreni hungarojn kaj Hungarion. La recitalon reĝisoris István *Iglódi,* unu el la plej bonaj hungaraj reĝisoroj; pasintjare li jam pruvis sian talenton antaŭ esperantistoj per *La aŭroroj ĉi tie estas silentaj.*

„Leteroj"

La 23-an de marto prezentis Ildikó *Pécsi* sian muzikan-literaturan solprogramon „Leteroj". La deko da kanzonoj, la belaj poemoj, la nostalgie emociaj kaj spritaj „leteroj" profunde impresis la publikon. La ĉefa fonto de la sukceso tamen estis la senceremonia, aminda personeco de la aktorino. Eĉ

Gabi Jobba en la Petőfi-recitalo



Ildikó Pécsi en la solprogramo



„Rozoj" – Belka Beleva, Miĥail Ĉobanov kaj Anani Anev



Roberto Bánky kun sia pupo en la parada revua programo

por momento ŝi ne forgesis pri la publiko, kaj malgraŭ tio, ke temis pri solprogramo, oni havis la impreson, ke ŝi konstante dialogas kun la publiko.

Ŝian kantadon fortepiane akompanis György *Aldobolyi-Nagy,* konata hungara komponisto, kaj aŭtoro de pluraj kantoj prezentitaj.

Parada revua programo

La 26-an de marto okazis distra vespero, kun la partopreno de ĉiuj kontribuantoj de la teatra programaro. Estis prezentitaj kantoj, poemoj, humuraj scenetoj (ofte memironiaj, ekz. sceneto iom ŝanĝita „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? "). La programojn anoncis du pupoj de la pupartisto Roberto *Bánky,* tre sprite, kaj foje-foje iom pipre. Ĉe la fino ĉiuj geaktoroj iris sur la scenejon, kaj kantis „Vivu la stel'", kiun baldaŭ kunkantis la plena salono.

Finalo de la parada revua programo

Ripetoj dum la UK

La partoprenantoj de la 68-a UK en Budapeŝto povos vidi – krom *Rozoj* – ĉiujn teatraĵojn, prezentitajn dum „Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj". Do, almenaŭ unu ripeto por ĉiu programo estas certigita. Tamen, oni devas konscii, ke ne longe eblos persvadi aron da bonaj profesiaj geaktoroj prepari programojn nur por 2-3 prezentadoj. Tial serioze lanĉiĝas la demando, ĉu ne troviĝus ebloj por gastrolado almenaŭ por la solprogramoj (la monodramo de *Beckett*, Petőfi-recitalo kaj „Leteroj") ekster Hungario? Por tio montriĝus la plej bonaj ŝancoj en socialismaj landoj, kie funkcias hungaraj kulturcentroj, ĉe kiuj la koncerna Landa Asocio povus kvazaŭ „mendi" tiujn programojn; sed kompreneble, kun ioma sagaco oni povus organizi kelkajn prezentadojn en ajna lando, kie ekzistas esperantistoj.

Ĉu venontjare?

En la nuna momento ankoraŭ ne certas, ĉu tiu ĉi printempa teatra aranĝo ripetiĝos venontjare? La gvidantoj de Budapeŝta Printempa Festivalo iom surprizite konstatis, ke nur ĉ. du trionoj de la biletoj estis venditaj, kaj tre malmultaj eksterlandaj spektantoj alvenis. Ĉu tiu modesta interesiĝo de la publiko estas io normala, ĉu simple ni malkapablas plenigi 240-personan salonon dum dek sinsekvaj vesperoj? Certe okazis misaĵoj ankaŭ en la organiza laboro, sed la problemo kuŝas ne nur en tio. Ni esperu, ke Nacia Turisma Oficejo decidos inkluzivi esperantlingvajn teatrajn prezentadojn ankaŭ en la programo de la venontjara Budapeŝta Printempa Festivalo – kaj ni pruvu, ke vere ni bezonas teatron!

La publiko videble fartis bone (Fotoj de Z. Fejér)

Gustumu la hungaran!

(Daŭrigo)

29. r (r) kiel en E-o
ár (a:r) 'prezo'
ára (*a:*r ɔ) 'ĝia prezo'
bor (bor) 'vino'
a bor ára (ɔ bor *a:*r ɔ) 'la prezo de la vino'
a bor jó (ɔ bor *jo:*) 'la vino estas bona'
a jó bor ára (ɔ *jo:* bor *a:*r ɔ) 'la prezo de la bona vino'
bora (bor ɔ) 'lia/ŝia/ĝia vino'
magyar (m ɔd' ɔr) 'hungara; Hungaro'
ember (*e*mber) 'homo'
emberek (*e*mberek) 'homoj'
három (h*a:*rom) 'tri'
három ember 'tri homoj'
óra (*o:*r ɔ) 'horloĝo, horo'
három óra 'tri horoj/horloĝoj; la tria horo'
kérek (k*e:*rek) 'mi petas'
Ferenc (f*e*renc) 'Francisko'

30. s (ŝ) kiel *ś* en E-o
esik (*e*ŝik) 1. 'li/ŝi/ĝi falas', 2. 'pluvas'
eső (*e*ŝö) 1. 'falanta', 2. 'pluvo'
és (e:ŝ) 'kaj'
férfi és nő (f*e:*rfi e:ŝ n*ö*) 'viro kaj virino'
... is (iŝ) 'ankaŭ...
én is (*e:*n iŝ) 'ankaŭ mi'
én is megyek (*e:*n iŝ m*e*d'ek) 'ankaŭ mi iras/os'
kés (ke:ŝ) 'tranĉilo'
késsel (k*e:*ŝŝel) 'per/kun tranĉilo'
késik (k*e:*ŝik) 'li/ŝi/ĝi malfruas'
késő (k*e:*ŝö) 'malfrua'
mos (moŝ) 'li/ŝi lavas'
só (ŝo:) 'salo'
sós (ŝo:ŝ) '/tro/salita'
János (j*a:*noŝ) 'Johano'
Miskolc (m*i*školc) nomo de urbo

31. sz (s) kiel *s* en E-o
csésze (ĉ*e:*se) 'taso'
csészében (ĉ*e:*se:ben) 'en taso'
egész (*e:*ge:s) 'tuta'
egész nap 'la tutan tagon'
egész éjjel 'la tutan nokton'
egészen (*e:*ge:sen) 'tute'
köszönöm (k*ö*sönöm) 'mi dankas'
rossz (ross) 'malbona' (ssz signas longan *s*)

32. t (t) kiel en E-o
eszperantó (*e*sper ɔnto:) 'Esperanto'
most (moŝt) 'nun'
bot (bot) 'bastono'
botot (b*o*tot) 'bastonon'
botok (b*o*tok) 'bastonoj'
botokat (b*o*tok ɔt) 'bastonojn' (rimarku la identecon de la ordo de la finaĵoj – unue la plurala, poste la akuzativa – kun tiu de E-o)
tojás (t*o*ja:ŝ) 'ovo'
tojást (t*o*ja:ŝt) 'ovon'
kenyeret (k*e*n'eret) 'panon'
kenyeret kérek 'mi petas panon'
tea (t*e* ɔ) 'teo'
teát (t*e*a:t) 'teon'
egy csésze tea (ed'd' ĉ*e:*se t*e* ɔ) (laŭ normala elparolo: et' ĉ*e:*se t*e* ɔ) 'taso da teo'
kérek egy csésze teát 'mi petas tason da teo'
kérek egy pohár bort 'mi petas glason da vino'
sört kérek (ŝ*ö*rt ke:rek) 'mi petas bieron'
ebédet (*e*be:det) 'tagmanĝon'
te (te) 'vi/=ci/'
ti (ti) 'vi' /pluralo/
őt (ö:t) 'lin/ŝin'
öt (öt) 'kvin'

33. ty (t'). Mola /palatala/ *t* /*t+j* prononcataj kune/, kiel en rusaj *tjotja*, *t*ebe, kaj kiel angla *t* en *T*uesday, ĉeĥa, slovaka *ť*, proksimume kiel serbo-kroata *ć*, albana *q;* franca *t* en *t*iens /laŭ rapida elparolo/
bátyám (b*a:*t'a:m) 'mia pli maljuna frato'
Mátyás (m*a:*t'a:ŝ) 'Matiaso'

34. u (u) /kelkfoje (ŭ)/. Ĝenerala elparolo: mallonga *u,* kiel en E-a h*u*ndo. En fremddevenaj vortoj post *a* – kiel E-a *ŭ* en a*ŭ*to /sed post *e* – aparta silabo/.
kutya (k*u*t' ɔ) 'hundo'
mutat (m*u*t ɔt) 'li/ŝi/ĝi montras'
mutatok (m*u*t ɔtok) 'mi montras'
fut (fut) 'li/ŝi/ĝi kuras'
futok (f*u*tok) 'mi kuras'
gyufa (d'*u*f ɔ) 'alumeto/j/'
gyufát kérek (d'*u*fa:t k*e:*rek) 'mi petas alumeto/j/n'
utca (*u*cc ɔ) 'strato'
autó (ɔŭto:) 'aŭto'
Európa (*e*-u-ro:-p ɔ) 'Eŭropo'

35. ú (u:). Longa *u*, kiel en E-aj *u*zi, m*u*so.
úgy (u:d') 'tiel'
úr (u:r) 'sinjoro'
út (u:t) 'vojo' /ankaŭ pli larĝa strato/
tyúk (t'u:k) 'kokino'

36. ü /ü). Mallonga labiala /artikulata ankaŭ per la lipoj, samkiel *u*/ vokalo inter *u* kaj *i.* Ĝi prononciĝas kiel la franca *u* en *u*tiliser; germana, estona, turka *ü* /mallonga/; albana, finna, dana, sveda *y;* ĉina *u* en j*u*n, q*u*n, y*u*n.
ülök (*ü*lök) 'mi sidas'
ülsz (üls) 'vi/=ci/ sidas'
ül (ül) 'li/ŝi/ĝi sidas'
ülünk (*ü*lünk) 'ni sidas'
ültök (*ü*ltök) 'vi /plur./ sidas'
ülnek (*ü*lnek) '/ili/ sidas'
ülök a széken (*ü*lök ɔ s*e:*ken) 'mi sidas sur la seĝo'

37. ű (ü:). La sama vokalo kiel *ü,* sed longa: franca *u* en p*u*re, nederlanda *uu,* finna *yy,* ĉina *u* en j*u,* q*u,* y*u*; germana *üh* en f*üh*len.
fű (fü:) 'herbo/j/'
mű (mü:) 'verko'

38. v (v) kiel en E-o
vas (v ɔŝ) 'fero'
vasút (v ɔŝu:t) 'fervojo'
vad (v ɔd) 1. 'sovaĝa', 2. 'sovaĝbesto'
jövő (j*ö*vö:) 1. 'venanta; venanto', 2. 'futuro'
Éva (*e:*v ɔ) 'Eva'
Vác (va:c) nomo de urbo

39. z (z) kiel en E-o
az (ɔz) I. 'tiu, tio'
az (ɔz) II. 'la' /uzata antaŭ vokalo/
az út (ɔz *u:*t) 'la vojo'
az utca (ɔz *u*cc ɔ) 'la strato'
az ember (ɔz *e*mber) 'la homo'
ez (ez) 'tiu ĉi, tio' /proksime al la parolanto/
ez az ember (*ez* ɔz *e*mber) 'tiu ĉi homo'
az az ember (ɔz ɔz *e*mber) 'tiu homo' /la unua *az* estas demonstrativo, la dua – artikolo/
ház (ha:z) 'domo'
vîz (vi:z) 'akvo'
vizet (v*i*zet) 'akvon'
kérek egy pohár vizes 'mi petas glason da akvo'
tűz (tü:z) 'fajro'
kéz (ke:z) 'mano'
zöld (zöld) 'verda'
zöld csillag (z*ö*ld ĉ*i*ll ɔg) 'verda stelo'

40. zs (ĵ) kiel *f* en E-o
rózsa (r*o:*ĵ ɔ) 'rozo'
zseb (ĵeb) 'poŝo'
a zsebben (ɔ ĵebben) 'en la poŝo'
zsebem (ĵebem) 'mia poŝo'
a zsebemben (ɔ ĵebemben) 'en mia poŝo'

I. *Botos*



Departemento Komárom

Laŭ sia teritorio ĝi apartenas al la etaj departementoj. Tamen ĝiaj geografiaj cirkonstancoj estas favoraj, ĉar ili entenas multe da vidindaĵoj, akvojn tiel same, kiel montojn. La Danub-kurbiĝo ĉe la nord-orienta angulo de la departemento signifas specialan belon por la turistoj, kiuj elirante el Budapeŝto vizitas ĉi tiun pitoreskan pejzaĝon de Hungario.

Tatabánya (tatabanja), la administra centro de la departemento estas la plej malnova kaj granda minejurbo de Hungario. En ĝia nuna formo ĝi estiĝis fine de la kvardekaj jaroj, per unuigo de kvar vilaĝoj, kaj nun ĝi estas unu el la plej junaj hungaraj urboj. Sed la historiaj rilatoj de la urbo estas multe pli malnovaj. En la proksimo de la urbo (*Vértesszőllős*) oni malkovris la spurojn de prahomo, vivinta antaŭ 40 mil jaroj.

Je la fino de la dekoka jarcento oni komencis mini la karbon. Pro la primitivaj cirkonstancoj de la laboro ofte okazis strikoj, ĝis fine post la dua mondmilito oni faris multe por maŝinigi kelkajn procezojn kaj sekve de tio la produkta teknologio multe evoluis. La moderna „urbo de karbo" havanta 70 000 loĝantojn, daŭre evoluas. La urbo samtempe estas turisma centro, de kie oni konvene povas alproksimiĝi kaj al la padoj de la montaro Gereĉe kaj al tiuj de la montaro Verteŝ.

Tata la t.n. „sektera" urbo, havas nenian riveron, tamen ĝi estas ŝatata ripozejo. El la akvoj de diversaj fontoj estiĝis la Olda-lago kaj per tio Tata fariĝis akvoriĉa ripozurbo. La plaĝoj, eblo pri akvaj sportoj, pitoreskaj parkoj, valoraj artobjektoj kaj muzeaj kolektaĵoj faras la urbon vizitinda. En la naturprotektata Popolparko, sur 46 hektaroj, la plej diversaj enlandaj kaj ekzotikaj kreskaĵoj ĝuigas la vizitanton.

En la parko konstruiĝis la moderna trejna kampadejo de la sportistoj, kie ili preparas sin por la internaciaj konkursoj. Ĉe la okcidenta bordo de la Olda-lago oni establis lernejon rajdistan, kun liberaera kaj tegita maneĝejo. La plej grava artobjekta vidindaĵo estas la Malnova Fortikaĵo, kies gotikaj ogivoj pitoreske respeguliĝas en la akvo de la Olda-lago.

Esztergom (estergom), la urbo de la Danub-kurbiĝo, havanta 26 000 loĝantojn, apartenas al la plej allogaj turismaj celoj en Hungario. Ĝi estis iam ĉefurbo de la lando, sekve ĝi estas speciale riĉa je historiaj artmemoraĵoj. La rava panoramo de la urbo kaj la valoro de ĝiaj konstruaĵoj de jaro al jaro altiras milojn da turistoj.

La romianoj okupis je la fino de la unua jarcento la ĉirkaŭaĵon, kaj konstruis konsiderindan urbon sur la loko de la hodiaŭa Esztergom (Strigonium). La filozofiema imperiestro, Marcus Aurelius plurfoje vizitis la tiaman urbon, kaj tie li verkis la 12 librojn

La renesanca baziliko en Esztergom

La Bakócz-kapelo en Esztergom (16-a jarcento)



Olda-lago en Tata

de „Meditadoj". La fortikaĵo de la romianoj eĉ dum la popolmigrado ne tute ruiniĝis, sekve ankaŭ nuntempe ofte malkovriĝas diversaj restaĵoj el la antikvaj tempoj.

La hungaroj ekposedis la teritorion je la komenco de la deka jarcento kaj dum la unuaj jarcentoj de la mezepoko Esztergom fariĝis centro de Hungario. La unuan reĝon de Hungario oni kronis en Esztergom. Li konstruigis tie la unuan bazilikon de Hungario, kaj de tiam Esztergom fariĝis la eklezia centro de la hungara katolikaro. Ĝis nun ĝi estas rezidejo de la primaso.

La Tatara (Mongola) invado en la dektria jarcento detruis la eksteran parton de la fortikaĵo. Post tio la tiama reĝo elektis urbon Buda, kiel centron de Hungario kaj per tio la ĉefurba rango de Esztergom ĉesis. La fama Kristana Muzeo kaj ties antikva arkivo estas konsiderinda vidindaĵo de la urbo.

Komárom la iama administra centro de la departemento, rekte apud la suda bordo de Danubo, nuntempe estas ĉefloko de provinca distrikto. Estante grava trairejo al Ĉeĥoslovakio (pere de ponto), ĝi havas viglan trafikon. Kelkaj partoj de la granda fortikaĵo, kiu havis gravan rolon dum la liberbatalo 1848/49, ankaŭ nuntempe estas videblaj. Proksime de la nuna urbo situis la plej grava militista kolonio de la romianoj, la iama Brigetio.

Tokod kaj *Dorog* estas tradiciaj bazoj de la hungarlanda karb-minado. Konsiderinda uzino estas ankoraŭ la vitrofabriko en Tokod.

Ĉe la suda limo de la departemento situas *Oroszlány* (oroslanj), la plej juna karbminejo en Hungario. Ĝi fariĝis tre moderna minej-uzino, kies produktaĵo nuntempe superas la du milionojn da tunoj jare. Ĉi tie funkcias la elektra centro de Nord-Transdanubio.

La komencoj de la E-movado en la departemento datiĝas en la dudekaj jaroj. La iniciatintoj estas karb-ministoj. Kelkajn el ili oni salutis en 1982, kiel veteranojn de la movado.

Nuntempe esperantistaj grupoj funkcias en Tokodaltáró, Tatabánya, Tata kaj Oroszlány. Ili aranĝas en ĉiu dua jaro departementan renkontiĝon, kiun kutime partoprenas ĉ. 80-100 personoj. En pluraj bazlernejoj oni instruas Esperanton.

István *László*

Nova kaj moderna urbo: Tatabánya

Tiu ĉi ponto en Komárom kunligas du landojn: Hungarion kaj Ĉeĥoslovakion

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

9. IDO-MOVADO - ĈU NIA MALAMIKO

En la jaro 1907 jam estis nur spekulacia la demando: kiu lingvo plej bone taŭgas por la rolo de la Lingvo Internacia? La vivo mem solvis tiun demandon. Tamen, kelkaj personoj lanĉis tiun pseŭdodemandon, kaj pseŭdoobjektive respondis, ke la plej oportuna solvo estas la *lingvoplano Ido.* La iniciatoroj estis lingvistoj *Léon Couturat* kaj *Léopold Leau,* **kiujn** forte apogis la prezidanto de la franca esperantista societo, *Louis de Beaufront.*

Starte ili klopodis konvinki la esperantistan Lingvan Komitaton pri la avantaĝoj de grandaj reformoj en Esperanto, ja – ili prave argumentis – Ido estas Esperanto reformita. Sed la Lingva Komitato restis ĉe la principo de la kolektiva lingvoevoluigo, kaj rifuzis la proponitajn ŝanĝojn.

En la esperantistaj grupoj kaj societoj, same kiel sur la paĝoj de la gazetaro, eksplodis granda diskuto pri la Ido-demando. *En la jaro 1908 okazis skismo en la Esperanto-movado. La eksiĝintaj reformemuloj formis la Ido-movadon.*

Epigono de la Esperanto-movado

Pluraj grupoj dizertis korporacie, precipe en Britio, Francio, Germanio, Svisio kaj Belgio. Tamen, *la plej multaj grupoj persistis, kaj akre kritikis la skismulojn:* iliajn agojn oni taksis perfido. Persistis ankaŭ la franca societo, elektante novajn gvidantojn anstataŭ la „perfiduloj". Laŭ tiutempa taksado entute nur 3-4 procentoj de la esperantistaro transiris al Ido, kvankam: inter ili estis ĉ. 20 procentoj de la gvidantoj (t.e. intelektuloj).

La eksesperantista Ido-movado establiĝis ĝuste laŭ la konata modelo. La revuo *Progreso* (1908-1914) estis ĝia renoma centra organo. Oni starigis lingvoreforman *Akademion.* Individuaj membroj apartenis al la internacia organizaĵo *Uniono di l' amiki di la Linguo Internaciona* (baldaŭ: *Uniono por la Linguo Internaciona),* mallonge ULI, simila al UEA, tamen sen ĝiaj servoj (kiujn imitis alia Ido-organizaĵo).

En la mezo de la jaro 1912 la movado ampleksis *200 grupojn en 20 landoj.* Germanio kaj Francio donis du kvaronojn. Landaj asocioj funkciis en Germanio, Francio, Svisio, Svedio, Danio, Ĉeĥio kaj Luksemburgio. En tiu jaro 23 Ido-periodaĵoj aperis. Cetere: la idistoj sukcesis „idistigi" el la Esperanto-gazetaro sole la revuon *Belga Sonorilo,* ĉiuj aliaj revuoj estis nove fonditaj.

L. de Beaufront en 1925



Unu kontraŭ la alia

Celo de la idista propagando kaj varbado estis altiri la esperantistojn. La novaj idistoj plejparte estis eksesperantistoj. Ido-lernolibro aperis ankaŭ Esperante, kaj oni *senpage* sendadis ĝin al esperantistoj!

Daŭris, eĉ akriĝis la diskutoj. En la esperantista kaj en la idista gazetaro nur foje-foje aperis argumentoriĉaj, seriozaj artikoloj, sed inundis la krudaj, eĉ personaj atakoj. Tiu malbenita situacio regis ambaŭflanke; t.e. kaj ĉe la „perfiduloj", kaj ĉe la „stultaj malmodernuloj". Regis malestimo al la kontraŭa alo. La atakoj konsumis la energiojn kaj dronis en stultaĵojn. Ekzemple: tiele oni kantis dum la klubvesperoj de nia „kulturmovado":

„Ni restas esperantistoj,
bum-lala, bum-lala,
Ni ridas pri l' Idistoj,
bum-lala, bum-lala."

Batalteren o fariĝis ankaŭ la nacilingva gazetaro, kio damaĝis al ambaŭ partioj. La mondo ekkonis la Internacian Lingvon kiel „internaciajn lingvojn", batalantajn unu kontraŭ la alia. Konsekvence: *en 1912-1913 ambaŭ movadoj ekstagnis.* Ne la unua mondmilito rompis la elanon, sed jam pli frue tiu milito!

La plej seriozaj esperantistoj kompreneble pli sobre alfrontis la problemon. Ekzemple tiu persono, kiu depost Zamenhof plej multe riĉigis nian lingvon: la tiam 21 jara *Kálmán Kalocsay* pli poste konfesis jene: „En 1912 mi sciis Idon same bone kiel Esperanton. Sed mi neniam partoprenis en la Ido-movado, nek verkis ion en Ido: mia interesiĝo estis pure lingva kaj ĉesis post la ellerno de mia Ido-libro."

Kontraŭ kaj por la literaturo

La du movadoj, Ido kaj Esperanto, diferencis kompreneble laŭ la lingvaĵo, sed ne nur lingve. La Ido-movado apenaŭ havis porpacajn klopodojn, tendencojn, „idealismon". En la jardeko antaŭ la mondmilito tutmonde fortiĝis la naciismaj, ŝovinismaj tendencoj kontraŭ la pacifismaj. Kaj la movadaj gvidantoj klopodis purigi la movadon disde ĉiuj „suspektindaj" pacifismaj ideoj – eĉ se ili mem estis pacifistoj, ekz. *Léon Couturat.*

La alia, eble pli granda diferenco komence estis, ke la Ido-movado apenaŭ havis belliteraturon. Se tamen kreiĝis ioma Ido-lingva belliteraturo, tio okazis kontraŭ la intencoj de la gvidantoj, kiuj *en Ido vidis nur pure praktikan ilon, sciencan aferon.* Jam komence aliĝis al la movado la kemiisto *Wilhelm Ostwald,* oferante por ĝi plejan parton de sia ĵus ricevita Nobelpremio. Dank' al tiu financa bazo, jam dum la unuaj jaroj aperis bone redaktitaj, ampleksaj vortaroj, ankaŭ fakaj. Ostwald kaj aliaj elstaruloj de la movado rigardis la *belliteraturon vantaĵo,* kaj apogis *„nur seriozajn",* t.e. sciencajn, teknikajn, praktikajn, komercajn aferojn, eldonagadon.

Tiu trajto de la Ido-movado ŝanĝiĝis nur post la forpaso de la unuaj gvidantoj dum la mondmilito, nur de 1917, en la nova, intermilita periodo de la movado. En la 20-aj jaroj aperis *originala kaj tradukita Ido-belliteraturo* en atentinda kvanto kaj kvalito. Kelkaj valoraj nacilingvaj verkoj pli frue aperis en Ido ol en Esperanto!



Naniĝo – sed ne malapero

La grandeco de la Ido-movado en la 1920-aj jaroj estis ĉ. dekono de la Esperanto-movado. Duono de la idistoj aktivadis en Germanio, Svisio, Francio kaj Ĉeĥoslovakio.

Reorganiziĝis ULI, kaj la laboristaj idistoj organizis siajn proprajn asociojn. Laŭnombre ili superis la „neŭtralajn" idistojn.

Dum la antaŭeniĝo de la faŝismo kaj dum la dua mondmilito la Ido-movado pli kaj pli malkreskis, kvankam dum la intermilita periodo okazis 15 kongresoj, ĝis 1939.

Post la dua mondmilito la movado malrapide reviviĝis, sed ĝi daŭre ekzistas. La nombro de la idistoj estas kelkcent, ili ĉiujare aranĝas renkontiĝon ie en Eŭropo. Aperas kelkaj Ido-bultenoj, kaj la renoma revuo de ULI, la *Progreso.* Sporade eĉ libroj aperas.

La efiko de la Ido-lingvaĵo

La Esperanto-movado dum la Ido-skismo liberiĝis disde la plej diversaj reformemuloj, kaj tiusence ĝi fariĝis pli homogena. Ĉia diskuto pri reformoj fariĝis tabuo, *venkis la fundamentismo, la severa lingva konservativismo.* Ĝi ligiĝas al la nomo de *Thèophile Cart* (1885-1931), talenta redaktoro de la *Lingvo Internacia,* poste prezidanto de la lingvaj institucioj en 1920-1931. Li atakis kun senlaca fervoro ĉiun neologismon.

Ankaŭ la Ido-movado havis la saman sorton. Dum la *lingvokriza periodo* (1926-1929) formiĝis „lingvokonservativa frakcio" kaj „Lingvo-progresiva frakcio", kiu lasta finfine memstariĝis, kaj akceptis la novan lingvoplanon *Novial.* Tiuj reformemuloj, eksidistoj, formis la novan Novial-movadon, tre malgrandan. Malgrandan, sed por multaj eĉ tio ne sufiĉis, kaj lanĉis siajn novajn lingvoplanojn.

En la 1930-aj jaroj la Ido-movado jam estis tiel malforta, ke ĝi neniel minacis la Esperanto-movadon, ĉesis la danĝero de la lingva reformismo. Ido fariĝis sensignifa por la esperantistoj, kaj tiu *nova situacio alportis definitivan malfortiĝon de la lingva fundamentismo.* En 1930 aperis la *Plena Vortaro,* kiun la movado akceptis kvazaŭ *oficiala norma vortaro.* Du jarojn poste la *Parnasa Gvidlibro* de

Kálmán Kalocsay kaj *Gaston Waringhien,* pliajn du jarojn poste la *Plena Gramatiko* de la samaj aŭtoroj ŝokis la fundamentistojn. Malgraŭ la lamentoj de la lastaj ekfloris la ankaŭ lingve moderna originala literaturo, akceliĝis la eldonado de modernaj fakaj vortaroj.

Trafoliumante hodiaŭ la malnovajn Ido-vortarojn aŭ legante Ido-tekstojn, ni vidas la duoblan parencecon de Ido-Esperanto. La Ido-vortprovizo siatempe estiĝis tiel, ke grandparte oni prenis la Esperanto-radikojn. Sed dum la lastaj 50 jaroj Esperanto siavice transprenis grandan parton de la originalaj Ido-radikoj! Tiurilate la du lingvaĵoj proksimiĝis.

Sed tio jam apartenas ne al la movadhistorio, sed al la *lingvohistorio de Esperanto,* kiu – strange: estas ekster la interesosfero de la esperantistoj. Jen, ni havas preskaŭ centjaran lingvon, pri kies historio ne nur fundamentaj verkoj tute mankas, sed eĉ malgranda broŝuro ne donas superrigardon!

Misprezento de MEM

Nikola Aleksiev
Honora Prezidanto de MEM

En n-ro 5/82 de la prestiĝa soci-literatura revuo „Hungara vivo" estis publikigita artikolo „Celoj kaj politikoj en la Esperanto-movado". Ties aŭtoroj estas la sinceraj italaj pacamantoj Renato Corsetti kaj Mauro La Tore.

Rilate Mondpacan Esperantistan Movadon ili asertas: „MEM kunigas *ĉefe komunistajn pac-emulojn,* kiuj difinas la kondiĉojn por paco laŭ *komunistaj analizoj*". Tamen la citita de ili artikolo 3-a de MEM-Statuto tekstas: „a. *Kiel unua kaj ĉefa tasko* (kursivo de la aŭtoroj) instigo al ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj partopreni la defendon de la paco kune kun registaraj kaj neregistaraj organizoj (politikaj, sindikataj, porpacaj, religiaj, kulturaj kc...."

Do, kiel videble MEM estas amasa *senpartia* porpaca movado kaj tute ne devigas siajn adeptojn nepre stari sur *komunistaj pozicioj.* Kaj se en la vicoj de MEM agadas ankaŭ certa nombro da komunistoj (verŝajne ne pli ol dek procentoj), ĉu tio signifas, ke ĉiuj MEM-anoj estas prokomunistaj? La esperantistoj tra la mondo bone konas similan kazon pri UEA: Persono, kun kelkaj profesorecoj kaj doktorecoj, akuzis UEA, ke ĝi estas „unupartie orientiĝinta organizo", ĉar en la vicoj de UEA kunlaboras sur egalrajta bazo komunistoj kaj nekomunistoj. El tio li faris malveran, primitivan kaj misprezentan konkludon, ke UEA „komunistiĝis"...

Se oni farus sociologian esploron pri la pozicioj de MEM-anoj oni konstatus vastan spektron de ideologia aparteneco: apud komunistoj troviĝas *vasta* tavolo de *senpartiuloj* aŭ membroj de *aliaj partioj.* El *religia* vidpunkto: apud ateistoj staras katolikoj, protestantoj, orient-ortodoksuloj aŭ adeptoj de nekristanaj religioj (inter MEM-anoj el Vjetnamio, Japanio k.a. landoj). En la oficiala organo de MEM „Paco" regule aperas speciala paĝo „Ekumena voĉo".

Alifoje mi citis katolikan MEM-anon, kiu trafe respondis al aserto de iu katoliko, ke MEM estas „ruĝa" movado: „Se la komunistoj aktuale estas pli agemaj en la pacmovado, kio malhelpas al katolikoj esti pli aktivaj ol ili? Aŭ eble iu opinias, ke se morgaŭ la atombomboj ekfalus sur niajn kapojn, ili nepre farus diferencon inter komunistoj kaj katolikoj? "

Ĝuste tio prezentas la *ĉefajon* de la temo pri pacbatalo. Kial *ne*komunistaj pacbatalantoj nepre devas kontraŭstari la partoprenon de komunistoj en la pacbatalo? Aŭ eble iu organizaĵo (movado) opinias, ke simila komplika, malfacila agado kiel la batalo por daŭra paco povas esti sukcese organizita nur per propraj fortoj de tiu organizaĵo? La Fina Akto de Helsinki, aprobita de Tuteŭropa konferenco pri sekureco kaj kunlaborado postulas *komunajn* agojn fare de ĉiuj landoj – sendepende de ties ideologiaj pozicioj. Kial tio ne rilatu ankaŭ al la diverstendencaj sociaj organizaĵoj aŭ movadoj celantaj konservi la pacon?

Se porpacaj pozicioj de komunistoj kaj nekomunistoj pri pacbatalo kongruas, ĉu oni rajtas prezenti la nekomunistojn kiel blindajn kaj miopajn instrumentojn de „Moskvo"? Ĉu ekz. „La Orienta Revuo" komunistiĝis skribante en n-ro 8/82: „Kun profunda kolero kaj indigno eksciis la progresema homaro pri la decido de usona registaro komenci plenskalan produktadon de neŭtrona bombo. Kune kun antaŭ-ne-longaj intencoj instali *mezdistancajn* kaj *flugilhavajn raketojn,* tiu ĉi plano provokas plirapidigon de vetarmado, pligrandigas la danĝeron de nuklea milito." (kursivo de O.R.). Tamen en Esperantujo bedaŭrinde troviĝas personoj, kiuj prezentas tiun tezon kiel „unupartian orientiĝon" kaj „propagandon de soveta pozicio pri la paco."

La usona prezidento Reagan publike akuzas la partoprenantojn en amasdemonstracioj por malarmado, por „frostigo" de la nuna nivelo de nukleaj armiloj, por realisma ekstera politiko kiel *instrumentojn de Moskva politiko.* Jen tamen kiaj ili fakte estas tiuj „instrumentoj":

– kandidato por prezidenta posteno el Demokrata Partio Kennedy, kiu kontraŭstaras la enormajn militelspezojn de usona registaro,

– prezidanto de Senata Komisiono pri eksteraj aferoj Charles Persy, kiu apelacias al la registaro de Reagan fari realismajn proponojn al Sovetunio rilate la mezdistancajn raketojn,

– 79 procentoj de usonaj civitanoj kiuj insistas pri tuja „frostigo" de nuklearmiloj (laŭ fama usona instituto por esploro de publika opinio),

– profesoroj kaj studentoj el unu el la plej prestiĝaj usonaj universitatoj – la Teknika Instituto de Massachusets, kiuj enmanigis al gvidantoj de Senato kaj al tiuj de la Kongreso protestan leteron kontraŭ la vetarmado. Ĝi portas

la subskribojn de 3250 personoj, inter kiuj: du ekskonsilantoj de la prezidento pri problemoj de scienco, kvar laŭreatoj de Nobel-premio, 11 sciencistoj partoprenintaj la preparon de la *unua* usona atombombo.

– Senatano Pol Teognes emfazis dum preskonferenco, ke la menciita letero estas des pli grava, ĉar devenas el instituto, kiu *neniam okupiĝis pri politika aktiveco.* Laŭ li *la aktuala politiko de usona registaro* intensigi la vetarmadon *eltiris profesorojn kaj studentojn el la stato de politika pasiveco.* Tiu freneza politiko de la registaro, li konkludis, devas esti likvidita.

Oni povus citi multajn similajn ekzemplojn, k.a. ŝtatojaliancoj de Usono. Ekz. la plenumkomitata prezidanto de Laborpartio Sam Maclosky deklaris: „Ni organizos nian balotkampanjon sur platformo pri *malpermeso* al *produktado de novaj nuklearmiloj* kaj pri *likvido de ekzistantaj nuklebazoj kaj nuklearmiloj sur brita teritorio."*

Certe la komunistoj subtenus plenkore similajn poziciojn. Ĉu el tio sekvas, ke la cititaj personoj, institutoj aŭ organizoj „komunistiĝis"?

Tamen ekzistas politikistoj, kiuj konas multajn similajn faktojn, sed havas intereson prezenti la pacbatalantojn kiel komunistojn por pli facile likvidi tiun por la militinstigantoj danĝeran movadon. Primitiva, foruzita argumento, sed kion fari, kiam mankas honestaj argumentoj... Ĉiuokaze la timigaj por iuj pac-emuloj vortoj „komunisto", „ruĝulo", „prosovetiulo", „fremdlanda agento" estas amase uzataj en la propagando de militaristoj. Kaj tiu propagando certe donas pli aŭ malpli abundan rikolton inter iuj politike pasivaj popoltavoloj. Tion oni konstatas ankaŭ inter la esperantistoj, kvankam ili estas sinceraj pacemuloj kaj propagandistoj de kompreniĝo inter la popoloj. Ĉu indas al personoj sendube honestaj kaj bonintencaj eĉ nevole peli akvon al imperiista muelejo? Feliĉe oni povas konstati ankaŭ tute alian fenomenon inter la esperantistaro: aliĝo al amasaj porpacaj demonstracioj, eliro el la politika pasiveco, ĉar temas pri Hamleta demando: „Ĉu esti aŭ ne esti?" Tion oni konstatis dum diskutoj en publika MEM-kunveno kadre de la Universala Kongreso en Antverpeno. Corsetti partoprenis ĝin kiel reprezentanto de UEA-Estraro.

La pacdefendantoj devas lerni el la taktiko de siaj kontraŭuloj. Estas farataj ĉiutage klopodoj de la imperiistaj ŝtatoj superi siajn internajn kontraŭdirojn, kuniĝi siajn fortojn por malunuigi la vicojn de la amasa kontraŭmilita movado, malfortigi ĝin ĝis plena likvido. Per tio oni celas altiri vastajn popolamasojn al subteno de la imperiista politiko de „limigita" aŭ „nelimigita" nuklea milito.

Ĉu ne trudiĝas laŭ si mem la konkludo, ke ankaŭ la pacadeptoj devas unuigi ĉiujn pacemulojn por povi sukcese kontraŭstari la fortan, malhonestan kaj jezuitan malamikon, des pli ĉar el tio gajnas la tuta homaro? Ĉu la esperantistaro ne devas partopreni tiun unuiĝan proceson, kiu sola permesus krei vere grandiozan movadon de *ĉiuj* pacbatalantoj, absolute necesan por la triumfo de la justa afero de l' Paco sur la tuta terglobo?

☆☆

Mortis Gyula Illyés

La 15-an de aprilo mortis Gyula *Illyés,* kiu jam almenaŭ de du jardekoj estis rigardata klasikulo de la hungara literaturo. Elstara poeto, dramisto, eseisto, li estis kvazaŭ viva konscienco de la hungara nacio. Li apartenis al tiuj malmultaj hungaraj verkistoj, kies libroj estas konataj ankaŭ ekster la etnaj limoj de la hungara lingvo.

Gyula Illyés
(1902-1983)

Ponto de Széchenyi

Kiom da libroj verkis li, kreiva!
Tamen, pli signifa
estas ĉi pont', ĉi viva!

Tra nobla ideo de krea imago,
fiksita skribe al neniu paĝo,
tra tiu mesaĝo
de kreint' mi iras de tago al tago.

Konsolo por mi estas, inda
tiu sciigo korpiĝinta.

Kia ĝoj'
paŝi sur belsenca fer-aloj',
legi ĝin tutkorpe dum la voj'!

Triumfon tuŝi povas mi permane.

Oni faligis lian verkon, vane.
Rekreskis ĝi, kiel la arbo, same.

Per tuta memo mi komprenas ion,
por koro karan, ĝojigan scion;
jen la rekono:

penso formortos neniam el mondo!
Ĉi-loke staros ĉiam ponto,
ĝis vivos homo!

Jen, ideo ferme
funkcias poreterne,
mirakla mekanismo,

kvankam kerne
estis nur homo – sperta pri risko –
la maŝinisto.

Tradukis: Márton Fejes

Tra muzeoj de Budapeŝto

En nordo de Buda la kelta vilaĝo *Ak-Ink* (Akv-Abundo) fariĝis la milita centro de la Romia provinco Pannonia (t.e. lando de Pan, dio de paŝtistoj). Ekde komenco de nia kalendaro dum kvar jarcentoj ŝirmis tiu provinco nordan Italion kontraŭ la invado de diversaj ĝermanaj kaj aliaj popoloj; la Romia Imperio ŝovis siajn limojn ĝis la tie fluanta Danubo. Aro da sklavoj kaj legioj konstruis tiun urbon *Acquincum*, granda, luksoplena, alte civilizita urbo. Promenante sur la pavimitaj antikvaj stratoj, kiujn dum longaj jardekoj elfosis diligentaj arkeologoj, inter la multaj restaĵoj de la granda ruin-areo oni eksentas la iaman viglecon, kvazaŭ la preterkurintaj ĉevalĉaroj nur hieraŭ tumultis apud la tegitaj foirejo kaj bazaro. Iliajn radspurojn ankoraŭ gardas la trotuaro, la banejoj pretas akcepti la riĉajn komercistojn kaj bienulojn, kies reliefaj portretoj eĉ nun spegulas la seriozan mienon de tiuj sinjoroj, ankaŭ la ĉarmajn vizaĝojn de la virinaj familianoj. Multspeca ilaro, hejma kaj metia, atestas pri la ĉiutagaj kutimoj kaj laboroj, muzikinstrumentoj, ankaŭ la surpriza *orgeno hidraŭlika*, pri la distroj, kaj la interno de la vilaoj ankaŭ pri la vintraj vesperoj, pri la necesa hejtado de sub la planko per varmigita aerofluo. Statuetoj de dioj kaj sklavoj, restaĵoj de ornamaĵoj el la loĝejoj kompletigas la vidindaĵojn de Muzeo de Aquincum. Apude amfiteatro, verŝajne por 5-6 mil spektintoj, estas vizitebla – sed ni menciu tuj, ke dum alveturo montras sin ankaŭ la Granda Amfiteatro, ŝajne por 15 mil spektintoj kun 20 enirejoj, kaj la rigardindaj restaĵoj de iama akvodukto, preter la ĉefvojo kondukanta norden (al Szentendre kaj Visegrád).

Se resti ĉe la historio, sendube, la *mezepoka Burgpalaco* estas la plej vizitinda kaj altinteresa vidindaĵo. Super Danubo majeste altiĝas sur monteto la *iama reĝa palaco*, grandioze rekonstruita el milita ruiniĝo. Ties suda alo – kun bastionoj kaj alta rondturo, rigardantaj al monto Gellért – kaŝas en sia profundo la mezepokajn salonojn de la renesancepokaj reĝoj (precipe tiujn de reĝo Matiaso), ĉambrojn, kapelojn kaj koridorojn, kuirejon kaj karceron, suferejon de iamaj punitoj. La marmoraj kaj ceramikaj artaĵoj elvokas imagon pri eleganteco, pri galanta, renesanca kortega vivo. En la Kavalir-halo estas plejparte eks-



La kavalira salono de la mezepoka Burgpalaco

La klasikisma Nacia Muzeo

poziciitaj tiuj mirinde realismaj gotikaj statuoj, kies malkovro (en subtera kortega rubejo) antaŭ jardeko estis arthistoria sensacio. Ankaŭ nia revuo raportis per ilustraĵoj pri la „bela kavaliro", pri la damoj, paĝioj kaj aliaj ravaj figuroj en n-ro 1976/4.

Super la longtempe kaŝe restintaj mezepokaj partoj oni kreis nun en la palaco *muzeon pri historio de Budapeŝto.* Pli ol du miljaroj prezentiĝas tra la salonoj pere de arkeologiaj kaj artaj restaĵoj, objektoj kaj iloj de la sinsekvaj kaj tie batalintaj popoloj. Armiloj kaj vestoj de turkaj agaoj, sultanaj „fermanoj" kaj porcelanoj kondukas al la moderna epoko de la Habsburga imperio, kiam ekfloras metioj, gildoj de teksistoj kaj juvelistoj klopodas majstre produkti eminentajn luksaĵojn kaj ne-tuj-forĵetindajn varojn por la simpla loĝantaro. La revolucio de 1848 estas abunde reprezentita per bildoj kaj armiloj, ankaŭ per la presmaŝino, „kiu" unue rompis la Habsburgan subpreman cenzuron per manifesto kaj ribeliga poemo de *Petőfi.*

La sukcese skiza – per objektoj – trarigardo de la teknika modernigo de la industrio, de la epoko de la elektro, donas klaran bildon pri la kresko de la metropolo, tra la unua mondmilito, tra la burĝa kaj proleta revolucioj ĝis la tiujn sekvinta reakcia regado, malfeliĉe kurinta en la militon flanke de la nazia Germanio. Kortuŝaj bildoj pri la ruiniĝo de Budapeŝto, pri la mizera stato dum la tiamaj monatoj – kiam ankaŭ tiu ĉi palaco preskaŭ neniiĝis pro la bataloj – montras la profundon, el kiu leviĝis la urbo al la nuntempa nivelo.

Se oni eliras el tiu ĉi – elstare moderne konstruita – muzeo, oni kutime iom promenas sur la bastiona koridoro por ĝui la belegan panoramon de Danubo kaj suda Budapeŝto. Kaj trapasante la surprize plurstacian elirejon por malsupreniri sur la monteta deklivo al la intera valo, ĉiam estas kelkaj, kiuj tuj paŝas en la loĝdomon de la fama kuracisto *Semmelweis,* „savanto de la patrinoj", kie nun *Muzeo pri historio de la kuracado*

Homoj sunumantaj printempe sur la ŝtupoj de Nacia Muzeo

ekspozicias interesajn ilojn kaj scenojn pri la pasinto de la terapiaj kaj sanigaj metodoj.

Pri iamaj kuraciloj kaj ties servantoj, do pri apotekistoj kaj ilia laborejo oni povas cetere jam sur la Burgmonteto ricevi spertojn: oni kreis el tradicia, malnova *apoteko „Ora Aglo"* apartan muzeeton, kiu gardas la originalajn ekipaĵon kaj meblojn, entute interesan lokon ankaŭ por laikaj vizitantoj (Tárnok u. 18.).

Por reveni denove al la historio, ni vizitos la ĉefverkon de la Hungarlanda klasikisma arkitekturo, ĉirkaŭata de granda ĝardeno kun multaj monumentoj (ankaŭ kolono de la Roma Forumo), la *Nacia Muzeo* levas sian imponan frontonon najbare de la mezepokaj muroj de urbo Peŝt, ĉe la mallonga Bulvardo „Muzeo" (Múzeum körút). En tiu ĝardeno okazis la revolucia amaskunveno en 1848 la 15-an de marto, tie oni disdonis la supre men-

La apoteka muzeo „Ora Aglo"

ciitajn sen-cenzurajn presitajn alvokojn; desur la granda ekstera ŝtuparo deklamis mem *Petőfi.* Tiel komenciĝis la rapida ĉesigo de la feŭdismo, kion sekvis preskaŭ jarlonga impeta liberbatalo de la nacio.

En la *arkeologia sekcio* altinteresa ekspozicio prezentas la vivon kaj kutimojn de la popoloj, vivintaj en la lando *antaŭ alveno de la hungararo.* Ja, ili abunde viciĝis en la tempo kaj en la lando: tiu regiono de Eŭropo estis vera trairejo de la popoloj dum la jarmiloj, precipe pro ĝia geografia situo. Riĉaj trovaĵoj de sciencaj elfosadoj konfesas tre multe pri prauloj de nun aliloke ekzistantaj popoloj (ĝermanaj, slavaj) kaj pri tiaj popoloj, kiuj pro ŝtormoj de la historio dissolviĝis, kaj postlasis apenaŭ pli da spuroj, ol la tie ĉi rigardeblaj...

En aparta loko estas gardata kaj publike rigardebla la trezoro de la *hungaraj reĝaj juveloj* – la alte respektita *krono,* la sceptro, kaj la ceteraj atributoj de la historiaj kronadaj ceremonioj.

En la muzeo trovas lokon ankaŭ riĉa *geologia ekspozicio* kun interesaĵoj de la hungara terhistorio, kiun amantoj de la naturo certe vizitos. Eble pli „ekscita" ŝajnas por la vasta publiko *du aliaj,* konstantaj ekspozicioj, kolektaĵoj de multjaraj esploroj, de pluraj ekspedicioj. *La mondo de la praaj bestoj* elmontras eksterordinarajn pecojn de paleontologio, ŝtoniĝintajn kaj rekonstruitajn prabestojn kaj vegetaĵojn. Pri nunaj tempoj montras la ekspozicio *Bestoj de Afriko* tre vidindajn scenojn, plejparte aranĝitain laŭ naturfideleco. La sovaĝa, ekzotika medio de la grandaj ĉasbestoj, vivantaj en la tropikaj regionoj de la granda kontinento, ilia moderna „surscenigo", prezentas tre plezuran viziton al la malproksimaj praarbaroj kaj riveroj de Afriko.

Aldone: ĉiuj muzeoj estas viziteblaj ĉiutage inter horoj 10 – 18 (escepte lundon) kaj *por kongresanoj – senpage.*

(Daŭrigota)

Ervin *Fenyvesi*

La gi̇ĉeto de HEA dum la ekspozicio Vojaĝo '83
(Foto de Z. Fejér)

PANORAMO

Vojaĝo

Ankaŭ ĉijare dum Budapeŝta Printempa Festivalo – inter 18-27 de marto – oni organizis en Budapeŝto vastan turisman ekspozicion sub titolo „Vojaĝo '83". La publiko de la ekspozicio havis eblon konatiĝi kun la ofertoj de ĉiuj hungaraj turismaj entreprenoj, informiĝi pri la turismaj ebloj de pluraj aliaj landoj, kaj eĉ antaŭmendi ekskursojn je favoraj prezoj.

En la ekspozicio partoprenis ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio: ĉe ĝia gi̇ĉeto oni povis informiĝi pri la Internacia Lingvo, aliĝi al kursoj, aĉeti librojn kaj revuojn.

Urba Parko – birdokule



Parkoj en Budapeŝto

La hungara ĉefurbo havas plurajn verdajn zonojn – inter ili la plej populara certe estas Urba Parko, situanta meze de Peŝt. Maljunaj arboj, artefarita lago taŭga por boatado, kaj la romantika kastelo Vajdahunyad faras ĝin ideala ripozloko.

Bravaĵo de la popola lignoskulpta arto



Arto el ligno

Grava materialo de la hungara popola arto estas ligno. Paŝtistoj ĉie volonte ornamis gravure siajn bastonojn, sed evoluis ankaŭ la pli pretendema lignoskulptado inter la popolaj artistoj, ja ligno estas ĉie disponebla, natura materialo, aparte inda al la popola arto.

PANORAMO

Loĝoĉambro de kamparana domo (Okcidenta Hungario)

Sopron – pordo de la iama Eszterházy-palaco

Porcelana majstraĵo el Herend

«Okcidenta pordo»

La urbo Sopron estas kvazaŭ „okcidenta pordo" de Hungario. Turistoj el Okcidenta Eŭropo plej ofte renkontas nian landon en tiu ĉi pitoreska, historia urbeto ĉe la piedo de Alpoj. La mezepokaj domoj de Sopron estas skrupule rekonstruitaj laŭ la originala stilo, kaj tiamaniere ili prezentas okulravan spektaklon por la gastoj.

Placo en Budaburgo – fone la Matias-preĝejo

Paradizo por turistoj

Budaburgo estas en la tuta hungara ĉefurbo la plej densa kolektejo de vidindaĵoj. Eĉ inter la multaj vidindaĵoj elstaras Matias-preĝejo, kaj la placo antaŭ ĝi kun malnovaj domoj, kreantaj tute specialan atmosferon.

Popola vivmaniero

En Hungario oni dediĉas apartan atenton al la konservo de memoro pri la iama kamparana vivmaniero. Tion servas pluraj vilaĝomuzeoj en la lando, kiuj prezentas la kamparanan vivmanieron de la koncerna regiono. Komparado de tiuj muzeoj evidentigas, ke eĉ en lando tiel malgranda kiel Hungario ekzistis surpriza varieco pri konstrua stilo, mebloj, objektoj de ĉiutaga uzo.

HUNGAROCOOP
BUDAPEST

Folkloro - Varo - Marko

La arto de la hungara popolo havas plurjarcentan tradicion, ĝi radikas funde en la nacia grundo.

Aparte tio validas koncerne la popolartajn manlaboraĵojn, kiuj havas intimajn rilatojn kun praaj popoltradicioj. La popolaj brodantoj de la fino de la 20-a jarcento revivigas en siaj kreaĵoj tiujn ĉi tradiciojn.

Dum la pasintaj kvindek jaroj la hungara popola motivaro kaj ties specifa kolorkombino havis sukcesan karieron en pluraj landoj de Eŭropo kaj la mondo. Ĉian disvastiĝon helpis la fakto, ke ĉie en la mondo troviĝas plimalpli grandaj hungaraj komunumoj, kiuj konigis la hungarajn manlaboraĵojn al sia medio. Tiu medio – ĉefe en Ameriko – tre alte taksis la praan aŭtentikecon de la hungara popolarto.

Serĉataj artikloj

Dum la lastaj jardekoj hungaraj manlaboraĵoj fariĝis serĉataj artikloj en Eŭropo, kaj eĉ en kelkaj landoj de aliaj kontinentoj. La harmonio de koloroj kaj motivoj konkeris la koron de ĉiuj belamantoj. Ĉiam pli da homoj ekkonis la hungarajn manlaboraĵojn, kaj rekonis kiel okulrave ili povas ornami la hejmon, kaj eĉ mem la homon: fariĝis tre popularaj ekzemple bluzoj kun broditaj hungaraj popolartaj motivoj. Tiuj bluzoj havas la avantaĝon, ke povas porti ilin personoj de ĉiu aĝo. Certe iu ajn nepre ĝojas ricevante tian donacon.

Krom bluzoj, kompreneble troviĝas ankaŭ aliaj manlaboraĵoj: tekstilaĵoj por mebloj, vestaĵoj, suveniroj. Tio signifas, ke hungaraj manlaboraĵoj bone estas uzeblaj sur ĉiuj terenoj de la vivo.

La vera efiko de niaj artikloj fontas el la alta kvalito kaj artismo. La kvalito en tiu ĉi kazo estas la kolorpompo, la ĉiuminute identigebla motivaro, t.e. la karakteriza kaj pure konservita formo de la motivoj de diversaj regionoj. Tiu arta efiko certigas, ke niaj artikloj troviĝas en ĉiam kreskanta kvanto ankaŭ en la vendejoj de Okcidenta Eŭropo.

La produktado kaj vendado de popolartaĵoj estas ne nur komerco, sed ankaŭ flegado de niaj naciaj tradicioj, de nia folkloro.

Jes, la folklora brodaĵo fariĝis varo. La broditaj kamparanaj bluzoj el la hungara vilaĝo Bereg konkeris Danion, Italio aĉetas pinglokusenetojn, skatolojn kun motivoj „Matyó", en Japanio oni entuziasmas por broditaj bluzoj, la aĉetantoj en Sidney renkontas en la vendejoj bluzojn kun motivoj „Matyó", suvenirojn broditajn en Kalocsa.

Tiuj ĉi popolartaj varoj efike reprezentas kaj popularigas Hungarion, kaj krome ankaŭ la regionon, kie la koncerna ornama motivaro naskiĝis. Jen, kiel tio okazas ekzemple ĉe la popolaj manaj teksaĵoj.

Manaj teksaĵoj estas tre varie utiligeblaj, precipe ĉe la ornamado de loĝejoj. Manaj teksaĵoj estas faritaj ĉu pure el kotonaj fadenoj, ĉu per kombinado de kotonaj kaj sintetikaj fadenoj. La plej famaj hungaraj popolaj manteksaĵoj devenas el la regionoj Sárköz, Baranya kaj Heves. La tradiciaj koloroj de la tipo de Sárköz estas blanka, ruĝa kaj nigra; en malnovaj tempoj la borderornamo estis ia metalfadeno, ne malofte ora aŭ arĝenta. Tiuj ĉi densaj teksaĵoj estas, malgraŭ la ĉefeco de la blanka koloro, moderaj.

La manteksaĵoj de Baranya elstaras kun siaj viglaj koloroj, kaj la baza koloro de la bunteco plej ofte estas la nigra.

La tipa bazo de la manteksaĵoj de Heves estas malstrikta linteksaĵo, en ĝi larĝstrie enteksita unukolora ornamo, ordinare ruĝa, verda, blua aŭ flava. Sed la plej solena ornamo estas blanka.

Kun tiaj ornamoj oni teksas kurtenojn, tablotukojn, murkovrilojn, buŝtukojn ktp.

Neceso de fabrika marko

Kutima afero en la monda merkato: popularajn varojn, kiuj ne havas protektitan fabrikan markon, oni falsas ĉie, eĉ en la plej foraj landoj. Oni ne bezonas klarigi, ke tio ofendas la prestiĝon kaj la komercajn interesojn de la originala produktanto.

Estis do necese certigi protekton por la hungaraj popolartaĵoj, kiu psikologie kaj ankaŭ jure diferencigas niajn artiklojn disde aliaj similaj varoj. Ĉion ĉi povas servi du aferoj: markonomo kaj emblemo. Rezulte de multaj planoj formiĝis tiu forme kaj enhave ideala grafikaĵo, kiun akceptis Entrepreno pri Ekstera Komerco HUNGAROCOOP, kiel fabrikan markon de siaj manlaboraĵoj, kaj registrigis ĝin ĉie. Ni esperas, ke la supre prezentita grafikaĵo ne nur protektos la hungarajn varojn, sed vekos la intereson de pli vasta aĉetantaro por la hungara popolarto.

REVUO DE REVUOJ

Malfeliĉa komputilo... ĝi lernos voĉlegi — ege grava tasko! kaj mi jam anticipe ridegas, kiel ĝi erarvagos en la ĝangalo de la angla legmaniero, kaj sekve ĝi mislegos sian tekston. Se jam la multe pli facilan germanan porkomputilan regulon (UE=Ü) ĝi, la malfeliĉulo, misas pri vorto kiel *Duell* (duelo), ne trafante ties E-similan elparolon, kion oni atendu de la «memkompreneble» angla-tipa klavaro se temas pri franclingva teksto, kiu ja havas multe da tn. diakritaj signoj super kaj sub la literoj? Kaj la aliaj lingvoj, kaj Esperanto? Ĉu ili ĉiuj devas rezigni pri sia ortografio, kiu apartenas al la nacia identeco? *Jes,* skribas *R. Fischer* en MONATO (1983/1), ĉar laŭ li, la *norma* alfabeto estas mem la angla, almenaŭ por komputiloj. Iam s-ro Remington kaj liaj kolegoj simile konsideris por tajpiloj norma sian anglan klavaron, do sen literoj de alilingvaj alfabetoj. Iam... Tamen la malnova Uson-devena skribmaŝino, kiun mi uzas por tajpi ĉi tiun artikolon, estis jam fabrikita kun 8 diakritaj literoj. Tio pli klare montras ol la negocan mondon subtaksanta kaj surprize naiva argumentado de Fischer, la vojon al la *normala* «konduto» de la komputiloj, t.e. respekto, adaptiĝo al la naciaj ortografioj! Tiamaniere nun jam facile eblas akiri taŭgajn tekstojn kun konvena klavaro ankaŭ en Eo — superflue ve-krii pri «bremsoj de Eo» en la komputado. Ni ne falu en kaptilojn de la angla lingvo-imperiismo!

Stefan Maul, kiu suplemente per facila mano reĵetis la strangajn postulojn de la menciita artikolo, en la sama numero demonstras la veran vizaĝon de kelkaj tendencoj ene de (aŭ malantaŭ) la Monda Komunika Jaro. Mi preskaŭ aŭdas la ĝenitajn ekkriojn de la komunikilojn fabrikantaj gigantoj, kiuj kaŝi volis, ke MKJ servas precipe por malfermi novajn merkatojn kaj trudi multekostan aparataron al malriĉegaj landoj. Sendepende de iliaj veraj bezonoj. Eĉ analfabetismo povos trankvile ekzisti tie, kolora televidilo kaj videomagnetofono en la Afrikaj kabanoj tute ne bezonas legoscion, kaj komputiloj baldaŭ ekparolos, ĉu ne? Aĉeton helpos pezaj kreditoj, nur aĉetu, aĉetu amase la luksajn komunikilojn, vi povos interparoli kun foraj, blankaj sinjoroj per telefonvidilo, kompreneble anglalingve (kial E-on por la komunikado?) kaj aŭdi novaĵojn pri alilanda progreso...

En la hungarlingva MONDO KAJ LINGVO (2.) de HEA la ĉefredaktoron *Szenes* Imre kontraŭdiras lingvistoprofesoro *Deme László* pri la nocio komunikado. Li konsideras ĝin *durilata* afero, kia estas la interparolo; la amas-informiloj (radio, TV) disradias sen respondeblo siajn informojn. La egalrajta interkomunikado nepre bezonas komunan duan lingvon, kiu ne regas super aliaj popoloj, sed servas al ili — li emfazis, atendante de la Budapeŝta UK ampleksajn diskutojn pri la tiurilataj sociaj kaj lingvaj kondiĉoj.

En HEROLDO (2.) ni legis ampleksan, tre legindan raporton pri sciencateknika aplikado, traktita en vaste internacia renkonto en GDR. Ĝoje mi salutas tiun gravegan sferon de nia movado, la vastiĝon kaj fortikiĝon en la fakaj medioj, helpe de kreskanta nombro de erudiciaj fakuloj. Tio estas aparte necesa, ĉar nur per vera aŭtoritato eblas rifuzi el nia lingva evoluo la ne-dezirindajn amatorecajn kaj senkompetentajn «kontribuaĵojn» kaj akiri seriozan rekonon ankaŭ ekster E-ujo.

Ne mankas do — feliĉe — bonvenaj disputoj en la Ea gazetaro, tamen fojfoje penetras ankaŭ falsaj sonoj, misaj voĉoj. Mi trovas stranga publikigon de malscienca «argumentado» (kun nacilingvaj figuroj!), kiu volas kredigi al la kompatindaj legantoj, ke aeroplanoj, atombomboj, nukleaj eksplodoj ekzistis jam dum la antikvaj tempoj... Sur antikvaj legendoj, mitoj kaj epopeoj konstruiĝas tiu ĉi sciencan esploron ŝajniganta fantaziaĵo (PACO, ĉeña eldono).

Rimarkinda vekiĝo videblas en la lastaj tri ampleksaj kajeroj de POLA ESPERANTISTO (1981-82), kiuj en nova formato publikas abunde el la pola literaturo, ankaŭ plaĉajn originalajn. La analizemo al la E-movado, koncerne ĝiajn direktojn kaj publikon, manifestiĝas en sinceraj kaj malkaŝaj studoj, kiuj ofte ŝajnas tro «sciencecaj», kun multe da (sociologiaj) fakterminoj kaj dirmanieroj; mi nur kore deziras al ili sufiĉe kompreneman kaj interesiĝantan legantaron. Intervjuo de *Kris Long,* poliglota angla literaturisto, kiu eminente tradukas polajn poemojn en E-on, malkovras sian interesan vojon al posedo de la pola lingvo kaj sian preferon al la Ea literaturo — malgraŭ ĝia malmoderneco.

Ankoraŭ en nia ĉijara unua numero mi citis la «promeson» de ISRAELA ESPERANTISTO pri certa reveno de la Bejruton atakinta armeo «kiam sian celon ĝi atingos»... Tiu promeso restis nura promeso senbaza, memkompreneble, kaj ĝuste pro tio mi salutas la *pli sobran* kaj ne fanfaroneman artikolon de *T. Lőwenkopf,* skizanta «la tragedion de la judaaraba konflikto», kaj «la ekeston de dekstrula, naciista reĝimo en Israelo», kvazaŭ responde al arabaj elpaŝoj. Sole prava analizo povas servi veran solvon de historie kreiĝintaj problemoj. SENNACIULO (3.) tiucele elmontras la aron da mensogoj kaj kalumnioj koncerne la Parizan Komunon en la francaj lernolibroj. Finfine, ili agis per tio kontraŭ la veraj interesoj de la francoj mem.

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

Ĉu ni vivos en amikeco kun la naturo?

Iam la homaro vivis en plena harmonio kun la naturo, adaptante sin al ĝiaj leĝoj; sed dum la du lastaj jarcentoj la homaro pli kaj pli forte intervenis en la ordon de la naturo. Pro tio multflanke malekvilibriĝis la naturo, kion kaŭzis ofte la malprudenta devizo: „triumfu super la naturo! "

Kompreneble oni ne povas rezigni pri certaj transformadoj en la naturmedio, sed tio devas okazi sen perturbi ĝian harmonion, aŭ se tio estas neevitebla, restas nepra devo ĝin pli altgrade ripari. Pri la limoj de niaj intervenoj bone skribis iam *Engels:* „... nia regado super la naturo ne estas tia, kiel konkerinto regas super fremda popolo, kiel iu eksterulo..., ĉar ni ja apartenas al ĝi, eĉ vivas en ĝi... kaj nia tuta regado super la naturo konsistas nur en tio, ke ni povas rekoni kaj ĝuste apliki la leĝojn de la naturo." La pravon de tiu filozofiema, sed ankaŭ poezia ideo pruvas ĉiuj spertoj kaj konoj. Tiraneca kaj senpripensa ekspluato de kaj manipulado pri la naturo nepre rebatas kaj plimalpli poste grave malutilas al la homoj.

Tiun principon rompis la homaro. Ni alvenis al tia stato, ke ĝuste tiam, kiam grave kreskas la nombro kaj bezonoj de la homaro, detruiĝas la naturmedio, elĉerpiĝas ĝiaj rezervoj, tiom necesegaj al la homaro. Kaj ni per pliiĝantaj kapabloj atakas kaj intense faradas damaĝojn al ĝi. Tiu kontraŭeco neeviteble kondukas al katastrofo, se ni ne konservas la tuton kaj regenerivon de la naturo, ĝiajn naturajn kaj konstruitajn ŝirmilojn.

Konvinka ekzemplo estas la historio de la antikva Mezopotamio preter la riveregoj Tigriso kaj Eŭfrato. Kiel konate, antaŭ 8 mil jaroj la tieaj popoloj senmarĉigis tiun ĉi landon, kaj surbaze de kanalizado ili kreis aron da prosperaj urbo-ŝtatoj, kiuj formis poste la regnojn de Sumeroj kaj de Akadoj. Pere de akvo la homoj igis fruktodona la regionon malgraŭ la varmega klimato – samkiel en aliaj landoj –, kaj la regiono restis tia dum jarmiloj, ĉar la mastrumado ne rompis la leĝojn de la akvo kaj grundo.

La historiisto *Herodoto* informas, ke la bela reĝino Semirama „konstruis admirindajn digojn kie la riveroj foje transformis senfina maro la tutan landon", la ebenaĵon de Babilonio, kie ekfloris grandioza agrikulturo. Kiam montaraj nomadoj penetris la landon, tiuj okupantoj admiris ĝin kvazaŭ dian paradizon – probable tiel estiĝis la legendo de la Biblia parko Edeno. Sed jarmilojn poste Babilono dekadencis, la racie establita irigacio neglektiĝis. Penetris la senakva, varmega, sabloplena dezerto, kaj la iama produktiva

Inspira harmonio de akvo kaj arbaro





Rezervujo servas la trinkakvo-provizadon (Lázbérc)

Edena tero iĝis lando de pereo. Tra la duondezertoj de Irako nur ruinoj gardas memoron de la iama metropolo kaj restojn de la antikva, altevoluinta civilizacio. La invadintaj popoloj ne nur ne prizorgis sian homkonstruitan medion, sed eĉ detruadis ĝin. Homa vandalismo kaj nekompetenco rapide neniigis kion laboremaj popoloj kreis dum longaj jarcentoj. Ne bremsitaj fortoj de la naturo sovaĝe akcelis la procezon de la pereo.

Analizante la kaŭzojn de la mediaj malbonoj oni rimarkas, ke inter ili ĉefas la manko de antaŭvido, krome la iluzio pri la neelĉerpebleco de la rezervoj de nia Tero. Ĝis la lastaj tempoj la homo praktike ne selektis inter la ekspluatataj naturdonitaĵoj, sekve ofte estiĝis ne-ripareblaj damaĝoj. La ne pripensitaj ekspluatadoj rompis la naturhistorie estiĝintajn ekvilibrojn kaj interrilatojn. Pro tio perturbiĝas la natura regenerado de la biosfero, okazas eĉ veneniĝo de tutaj vegetalaj kompleksoj: la ekologia memregulado ĉesis funkcii pro troŝarĝiteco.

Pro la akcela progreso la socio pli kaj pli multe konsumas en la naturo, sed aliflanke pli kaj pli montriĝas la limigitaj spacoj kaj ebloj de nia Tero: jam bone rimarkeblas ke oni ne povas senfine disvastigi la uzon kaj ekspluatadon de nia naturmedio.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj de la nuna krizo konsistas en tio, ke ni prenas el la Tero egan amason da krudmaterialoj, kiuj estas transformitaj fabrike novtipaj, sintezaj materialoj; poste tiujn (kaj ankaŭ ties flankproduktaĵojn kaj rubaĵojn) ni denove encirkuligas en la medion. Tiamaniere multfoje akumuliĝas damaĝaj, poluciantaj materialoj, ĉar tiuj ne povas reintegriĝi en la ekologian sistemon de nia planedo.

Pro la granda energioutiligo ĉ. 360 000 milionoj da tunoj da karbondioksido iris en la atmosferon dum nia jarcento: tre verŝajne tio faros sian efikon je la termo-bilanco de la Tero. Ĉiaspecaj poluakvoj, detergiloj, pesticidoj, oleoj polucias la lagojn, riverojn kaj marojn.

Pro novaj industriaj kvartaloj, urboj, ripozejoj, ankaŭ pro plimultiĝo de kondukiloj, ŝoseoj, publikaj ejoj grave malpliiĝas la kultivebla areo de la Tero kaj la vegetale kovritaj pejzaĝoj, la arbaroj kaj marĉoj. Pro erozio kaj sodiĝo jam 500 milionoj da hektaroj da agroj iĝis neproduktivaj.

La multspecaj poluciaj materialoj (oleo, poluakvo, fekaĵoj, laviloj, sarkiloj ktp.), krome la troaj kemiaj sterkado kaj vegetalprotektiloj tutmonde efikas la vivularon de la grundo kaj la vegetaĵojn.

Sekve de la kreskantaj ŝarĝoj kaj poluciado je la medio, kreskas la homojn atingantaj, t.n. civilizaciaj damaĝoj. Plioftiĝas la stomakaj ulceroj, infarktoj de l' koro, kronikaj malsanoj de l' spirorganoj, neŭrozoj ktp., al kiuj oni aldonas la malsanigajn efikojn de diversaj kemiaĵoj penetrantaj en la homan organismon.

Kreskas ankaŭ ŝarĝoj de la vegetala kaj animala regnoj. En Eŭropo 6-17 procentoj de la floraj plantoj malaperis en ĉirkaŭaĵo de grandurboj kaj

industrikvartaloj; duono de la tie vivantaj specioj estas survoje al la pereo.

Dum la lastaj tri jarcentoj formortis pli ol 200 specioj de mamuloj kaj birdoj sur la Tero. Dum la lastaj cent jaroj tiu procezo plirapidiĝis; ĉar malaperis 100 specioj, kaj dum la pasintaj 50 jaroj 76 specioj foriĝis el la Tera faŭno. Ceteraj 550 specioj de mamuloj kaj birdoj vegetas jam ĉe sojlo de la formorto...

Jen la argumentoj kiuj konvinkas, ke malŝpara mastrumado kaj troigata produktado kaŭzas egajn, plejparte neripareblajn damaĝojn. La naturo venĝas sin kaj repostulas kun grandaj plusoj kion la homo forprenis de ĝi pro la forte ampleksigita produktado. Oni ne forgesu, ke la profito de la produktado venas parte el la damaĝo de la medio. La nunaj generacioj havas egan respondecon, ĉar ilia agado akcelis la renversadon de la biologia ekvilibro.

La interrilatoj de homo kaj naturo

Ĝis la ekesto de la industriaj socioj, la rilatojn de la homo kun la naturo karakterizis la kompleta dependeco. La etnombra kolektanta, fiŝanta-ĉasanta homgrupo, ties primitivaj iloj kaj limigita agado – la nura vivtenado – apenaŭ influis la ĉirkaŭaĵon. Kaj tiel restis kiam niaj dombestoj estis malsovaĝigitaj kaj komenciĝis ilia paŝtado. Tiutempe abunde troviĝis bona akvo, sed multe poste *Anakreon* jam neniam neglektas mencii la *pure lirlantan rivereton* en siaj kantoj: ili iĝis jam sopirataj lokoj de virga naturo, simboloj de silenta trankvilo vizitinda, en epoko kiam pro transiro al agrokulturado kaj densiĝo de loĝlokoj, la hakilo, fajro kaj plugilo forte transformis la originalan vegetaĵaron, la naturan ĉirkaŭaĵon.

La amasiĝanta loĝantaro, la komenciĝantaj metioj pli kaj pli disradiis homan efikon en la ĉirkaŭaĵon kaj transformis la proporciojn inter la naturaj kaj artefaritaj mediaj faktoroj. Proksime de muelejoj, minejoj, fornoj, segejoj maldensiĝis la arbaroj, sed vastiĝis la kampoj, agroj kaj paŝtejoj. Tamen restis ankoraŭ karakterize, ke loĝlokoj kaj kultivataj areoj staris sub efiko de la protektanta arbara mikroklimato.

Regula mezurado

La efikoj de la unua industria revolucio

Meze de la 18a jarcento la industria revolucio jam komencis efiki. Pli rapide ŝrumpis la natura vegetaĵaro, la arbaro, kies lokojn okupis agro kaj paŝtejo, eĉ kelkloke la agrikulturo tute forigis la arbojn.

Post ekuzo de la vapormaŝino en la agrikulturo, la situacio malboniĝis. La maŝinoj bezonas pli vastan terenon, la arboj nur ĝenas ilian agadon: necesis do ilin forigi desur la kampoj, kie krome jen gregoj, jen rikoltiloj detruis la ekkreskantajn arbetojn. Pere de la benzinaj kaj elektraj motoroj la akceliĝinta ekonomio ricevis antaŭe ne-

Laboratoria kontrolado de akvospecimenoj



niam imagitan rimedon: konjunkturoj kaj konkurencadoj igis regi en la mensoj tuj-ekonomian pensadon, forgesigante pri la racia antaŭvido pri la daŭraj efikoj en la naturo.

La industriejojn ĉirkaŭantaj proletaj kvartaloj, la plenŝtopitaj loĝ- kaj laborlokoj, la naturon foriganta kaj preskaŭ tute artefarita ĉirkaŭaĵo de la homoj, pli kaj pli sentigas mizerajn konsekvencojn. La kreskanta hominundo al la urboj postulas – same ankaŭ la ampleksiĝantaj industrio kaj trafiko – tiom da loko, ke preskaŭ malaperas en urbaj internoj la verdaĵoj kaj parkoj, malgraŭ la kreskanta bezono. Ĉar multe plidensiĝas en urboj la fumo kaj fulgo de fabrikoj kaj loĝejoj, la malutilaj brulgasoj de eksplodmotoroj, la polvo de tumultoj pro la densa loĝantaro. La urbanoj suferas pro ĉiuj ĉi: malbonfarto kaj malsanoj estas la konsekvencoj ĉe multaj.

La sekvoj de la dua industria revolucio

La dua, nomata „scienca-teknika" revolucio, forte plivastigas la industrian produktadon: plimultiĝas la specoj de produktaĵoj, ankaŭ ties volumeno iĝas jam giganta. La agrikultura produktado same rapide alprenas industriajn trajtojn.

Paralele kun tiu progreso ege kreskas la ekspluato de la mineralkrudaĵoj kaj energiaĵoj de la Tero, aliflanke ankaŭ la nocaj malutiloj en la naturmedio, minacantaj ofte la homan sanon. Kvazaŭ la homaro provokus sian propran vivdanĝeron...

Kaŭzis grandan konsterniĝon, kiam oni devis konscii, ke la Teraj rezervoj de la mineralkrudaĵoj havas sian limon: la kalkuloj severe montris, ke laŭ la nuna ritmo de konsumado, post nelonga tempo pri energio kaj produktado manifestiĝos bremsaj perturboj. Kvankam la akvo kaj la aero ne konsumiĝas, la akcela produktado kunportos en ili jen kemiajn, jen fizikajn ŝanĝojn (ekz. pleniĝon per poluciaj kombinaĵoj, aŭ riveroj varmiĝas pro varmakvoj de energicentraloj; kreskas la proporcio de CO_2 en la aero). La konsekvencoj havas biologiajn efektojn en la tie ekzistantaj organismoj.

Aparte menciindas, ke dum la historio la homaro neniam movis aŭ perturbis tiom da teramasoj por transformi kaj ekspluati, kiom dum la lasta duonjarcento! Gigantaj amasoj da rubaĵoj kaj defalaĵoj akumuliĝas nuntempe rezulte de fabrikadoj. Mediaj perturboj aperas en la industriaj landoj pro la rapida kreskado; al tiuj kontribuas ekologie malraciaj konduto, vivmaniero, ne laste malŝparo pri energio kaj materialoj. Kaj paralele, akumuliĝas rubaĵoj, kiuj pli malrapide malkomponiĝas ol produktiĝas. La kreskanta produktado de karbondioksido ne farus zorgojn, se la natura cirkulado de materialoj reuzos, resp. liberigos la karbonon kaj oksigenon.

Pri la interrilatoj de la homo kaj naturo estas rekomendinde konsideri la pensojn de la hungara Nobel-premiita biologo Albert *Szentgyörgyi* (sentdjerdji):

> *„Dum la naturo estas grandega, la homo restas eta; la homa vivo, ĝiaj maniero kaj nivelo ĉiam dependis de la interrilato de la homo kaj naturo, de la grado kiel li povis kompreni la naturon kaj ties fortojn utiligi... Kiel ĉiuj ekzistantaj specioj, ankaŭ la homo adaptiĝis al la mondo, kie li elformiĝis. Antaŭ centmilo da jaroj tiu mondo estis tre simpla, same liaj problemoj: kiel vivteni sin de tag' al tago, trovi nutron kaj protekton, jen lia tiama ĉefproblemo... Liaj cirkonstancoj laŭgrade pliboniĝis, kiam li lernis formi kaj uzi ilojn; la inventoj de la fajro, kudrilo, rado, sago, metaloj, ceramiko ktp., signis la staciojn sur la vojo de l' primitiveco supren. Tiuj inventaĵoj devenis el la ĉiutagaj spertoj. Nur unikaj pintoj de la*

Pluveca aspergado kontribuas al granda produkto

homa menso, kelkaj el la Egiptia kaj Helena-Romia kulturoj provis fojfoje kompreni la naturon: tiu „antikva scienco" fidis je supereco de la pensado, de la menso, kiu kapablas – oni opiniis – solvi ĉian ajn problemojn. (...) Post kelkjarcenta latenta periodo la klasika scienco kondukis al la industria revolucio de la 18a jarcento, kaj ĝi forte antaŭenigis la vivnivelon de la homaro. Eksvingis ĝin, tamen ne kunportis ion kvalite novan. La kudrilo estis konata jam de jarmiloj, la teksmaŝino nur pli rapide kaj pli bone teksis. Simile la lokomotivo – tiu fer-ĉevalo – nur postlasis la ĉevalon kaj igis pli agrabla la vojaĝon. Malpliiĝis la mortokvanto, amplekSiĝis la nutroprodukto, kreiĝis nova socia klaso, la industria laboristaro – sed entute la aspekto de la mondo restis la sama.

Dum nia jarcent-turno kvar gravaj malkovroj signis la komencon de nova periodo en la homa historio: la iks-radioj (1895), la elektrono (1895), la radioaktiveco (1896) kaj la kvantumo (1900), kiujn sekvis baldaŭ la teorio de la relativeco (1905). Neniu el ili estis perceptebla de niaj sensorganoj. Formiĝis mondo ĉirkaŭ la homo, pri kiu antaŭe li nenion konjektis, pri kiu liaj organoj liveris absolute nenian informon. La homa historio nun jam dividiĝas je du aktoj, kiujn apartigas la apero de la moderna scienco ĉirkaŭ la jarcentturno. Dum la unua periodo la homo vivis en tiu mondo, kie lia genro naskiĝis, al kiu liaj sensorganoj adaptiĝis. En la dua periodo li transpaŝis en novan, kosman mondon, tute fremdan al li. Neniam dum sia historio la homaro travivis tiel abruptan ŝanĝon.

Post apenaŭ duonjarcenta latento la moderna scienco ekŝanĝis la homan vivon, enkondukante faktorojn, kiuj antaŭe eĉ sonĝe ne aperis. La homo posedas jam ne nur terajn, sed ankaŭ kosmajn fortojn, tiujn, kiuj kreis la universon. Niajn mil C gradajn terajn flametojn ni ŝanĝis je la miliongradaj varmegoj de la atomreakcioj, je la suna ardeco.

La rapidecon de la ĉevaloj ni ŝanĝis je rapido de la sono, eĉ de la lumo; la relativan maldanĝerecon de la armiloj eksigis la forto de atomo, kapabla havenojn bari, montojn movi kaj komunumojn neniigi dum sekundoj.

Ni ekvivis en nova kosma mondo, al kiu la homo ne adaptiĝis. Ĉu li pluvivos, dependos de lia rapida kaj ĝusta adaptiĝo, ĉu li kapablos transformi siajn pensojn kaj ideojn, siajn sociajn, ekonomiajn kaj politikajn organizojn. Lia ekzisto dependas de tio, ĉu li povos pli rapide adapti sin antaŭ ol malicaj fortoj pereigos lin. Lia momenta situacio ŝajnas malfavora. La tempo devigas nin alfronti tiun situacion per cerbo prahoma; per cerbo, kiu ne multe ŝanĝiĝis depost sia formiĝo. Kun arkaiĝintaj pensmaniero, institucioj kaj metodoj estas niaflanke akceptataj la novafoj."

Tiuj pensoj de Szentgyörgyi aludas al la profundeco de la problemo inter homo kaj naturo.

Maltrankviliga riverbordo



La solvo de la kontraŭecoj en la ekonomia-teknika progreso

Estas konate, ke la kaŭzoj de la scienca-teknika progreso troveblas en la sociaj bezonoj: en nia epoko tiuj devenas parte el postuloj pri la vivnivelo, parte el la rapida plimultiĝo de la Tera loĝantaro. La scienca-teknika progreso portas revoluciajn trajtojn, i.a. tiaj estas la salte rapidaj transformiĝoj de la teknologio, la ega kresko de la produktado, la vasta utiligo de novtipaj energiaĵoj kaj materialoj.

Tio jam montraș, ke inter la ekonomia progreso kaj la stato de la homa medio troviĝas certa kontraŭeco: la fina kaŭzo de la media malboniĝo estas la pliampleksigo de la ekonomia agado. Tiucele la homo

– intervenas en la ordon de la naturo, pli forte ekspluatante la teron – surface kaj profunde –, la akvojn kaj arbarojn;

– faras amasan produktadon per mekanizado, kemiizado, bredado kaj fabrikado;

– instalas amasan trafikadon en neniam ekzistintaj egaj dimensioj en ĉiuj sferoj de nia planedo;

– surbaze de la sukcesa ekonomia agado, eksterordinare disvastigas la urbanizon, provizante homamasojn per modernaj vivmanieroj;

– altgrade modernigas ankaŭ la vilaĝajn regionojn; kaj

– disvolvas aparte rapide la ripozejojn, eĉ ripozregionojn.

Facile pripenseblas, ke *tiuj konsekvencoj de la ekonomia progreso* eventuale malbonigos la homan ĉirkaŭaĵon, kaj la naturon kaj en la loĝlokoj: tio eble bremsos poste eĉ la ekonomian progreson!

Post ĉesinta surfaca mineksploato la vento kaj pluvo plu diserigas la nudajn tavolojn kaj polucias la ĉirkaŭe troveblajn akvojn kaj vegetaĵon; pro la mineja pumpado subiĝanta akvonivelo damaĝas la vegetaĵon, kaj malfaciligas, plikostas la akvoprovizado por la tiea loĝantaro, eĉ pli grave tiu por la produktado. La agro-kemiizado, celanta pliprodukton, povas endanĝerigi la homon kaj lian ĉirkaŭaĵon: pro neĝuste aplikita, eĉ troa sterkado la nitrogeno kaj fosforo penetras en la fluojn, kaj en la grundon, de kie ili povas vaste disiĝi ankaŭ al aliaj regionoj.

La ne bone regulitaj defluaĵoj kaj grundakvoj kuntiras baldaŭ gravajn damaĝojn: sodiĝo, humo-detruiĝo kaj marĉiĝo eksigos agrojn el la kultivado.

La amasa produktado, ĉu en fabrikoj, ĉu en agrikulturo, eligas multege da diversaj rubaĵoj kaj defalaĵoj, ofte venenaj. Aldonu ankaŭ la grundon, aeron kaj akvojn poluciantajn, diversajn fulgojn, polvojn kaj gasojn de bruoj kaj vibradoj. La urbanizo, la plidensiĝo de la loĝantaro multe koncernas la mastrumajn, hejmajn rubaĵojn, sekve kreskas ties volumenoj kaj proporcioj. Se la komunumo ne zorgas konvene pri ilia manipulado kaj neniigo, niaj propraj defalaĵoj multe minacos nin mem kiel loĝantojn.

Ankaŭ en Hungario la kaŭzoj de la mediaj nocoj remontras al la rapida ekonomia progreso kaj al la urbanizo. La spertoj pruvis, ke ju pli alten evoluis iu lando, des pli urĝas la neceso serioze alfronti ĝiajn mediopoluciajn zorgojn. Pro tio iĝas nepra devo de la socio, konsideri kaj praktiki la medioprotekton kiel integran parton de la tutlanda ekonomia disvolvado.

Tra la mondo oni multe diskutas pri tio, ĉu la detruado de la medio estas neevitebla dum la scienca-teknika revolucio? Ŝajnas tre malfacila afero respondi ĉi demandon, kaj unusence certe ne eblas. Certagrade estas neeviteblaj iuj mediaj detruadoj pro la industria kaj teknika disvolvo;aliflanke ili tute ne bezonas atingi tiajn dimensiojn, kiuj minacas jam mem la homan ekziston. Male, la teknika progreso ne nur damaĝas la homan medion, sed ankaŭ favore transformas ĝin. Tion emfazas nia medio mem, kiu tute ne konsistas nur el naturheredaĵo, el virgaj naturdonitaĵoj, ĉar tiun medion grandparte kreis dum sia historio mem la homaro, celtrafe transforminte ĝin por siaj vivbezonoj. Kaj la homo ankaŭ plu kreos kaj transformos sian ĉirkaŭaĵon, kiu siavice ankaŭ reagos al la homa vivo.

Ĝuste la progreso de la tekniko prezentas sin espereble la plej kapabla rimedo por preventi la poluciadon de nia medio kaj igi multe pli ekonomia la utiligon de la naturo. Sukcesplenan ekzemplon montras la grandioza purigo de la tute malpuriĝinta Themze-rivero pri altaj kapabloj de la scienco kaj tekniko por likvidi la damaĝojn kaŭze de la tekniko. Similajn rezultojn ankaŭ alilande kaj alisfere atingis la homprotekta scienco, favore al nia Tero kaj favore al la homaro.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Post pluvo restas multe da cementpolvo sur la folioj proksime al la cementfabriko

Ankaŭ la aero malpuriĝas

El „Hungara Antologio"

MURDO

Géza Csáth
(1887-1919)

En la restoracia vagono de rapidtrajno ni renkontiĝis kun Béla Gecső, filo de la riĉega Zoltán Gecső. Ni ambaŭ tre ekĝojis, revidante unu la alian.

– Kien vi vojaĝas? – mi demandis.

– Al Budapeŝto mi veturas, kaj restos tie. Hejme mi ne plu eltenas.

– Ĉu pro via patro?

– Jes, ankaŭ kun li mi ĉiam konfliktas, vi ja scias... pro tagsalajroj kaj similaj.

– Evidente, la socialismo ne plaĉas al lia sinjora moŝto.

– Kaj eĉ malpli, ke ankaŭ mi estas socialisto.

– Verdire, tio ne decas al heredonto de kvincent-arpenta bieno.

– Sed nun mi havas ankaŭ aliajn kaŭzojn forlasi la hejmon.

– Kiajn kaŭzojn?

– Ĉu vi ne aŭdis pri mia afero?

– Absolute nenion!

– Do, bone rigardu vian amikon, kiu murdis homon.

– Ne ŝercu!

– Sed ja mi murdis homon. Kiel simple mi diras, ĉu ne? Kaj kiel damne simpla afero ĝi estis! Sed aŭskultu min!

Ĉio ĉi okazis la dudekan de julio, antaŭ du semajnoj.

Meznokte mi enlitiĝis. Doloris mia kapo, mi ne povis ekdormi. Jam pli ol horon mi baraktis en la lito, kiam mi subite aŭdis segan, muelsonan bruon. Estis nura hazardo, ke mi alpremis por momento la doloran kapon al la muro. Tiam mi ekaŭdis tiun strangan bruon. Mi forprenas mian orelon – denove mi aŭdas la sonojn. Iu devis brui ĉe la alia flanko de la verando! Mi atendas, ke la hundoj ekbojos, sed ili ne bojis, tial mi trankviliĝis.

Vi ja konas, kia mi estas. Nervoza, do malkuraĝa. Ankaŭ pro tio mi havis multe da malagrablaĵoj kun mia patro, kiu imagis, ke mi heredos lian sangvinan temperamenton, same kiel ekzemple la nobelan blazonon. Do, malkuraĝa mi estas. Sed kiam post iom da tempo mi denove aŭdis la sonojn, tamen mi decidis, ke tiun mistikan aferon mi mem esploros. Alian eblecon mi ja ne havis, ĉar la supra domo, kie dormis la familio, situas almenaŭ cent metrojn for de ĉi malsupra, malnova domo, kie sola mi dormis.

Estas kurioze, ke vespere dum la manĝo, ĝuste tion mi klopodis pruvi al mia patro, kiel ridende kaj absurde estas puni tre severe la ŝtelon, kiam ĉiu – kiu havas stomakon – havas denature ankaŭ la rajton manĝi, kaj se al li mankas manĝaĵo – ŝteli, ĝuste pri tiaj aferoj ni diskutis... Nun atentu bone! En la sekva momento mi surprenas ŝtrumpojn kaj pantalonon, poste spirretene mi malfermas la pordon de mia ĉambro. Mi ne scias, ĉu pro la kapdoloro, sed neniom da timo mi sentis. Mi aŭskultis. La ŝtelisto aŭ rabisto agis tre singarde. Preskaŭ fakscie. Mi memoras, ke en tiu malhelo mi ekridetis pro la vorto „fakscio". Poste mi palpis miajn brakojn, sentis, ke mi estas forta, kaj tiam pli mi ne deziris, nur vidi, eĉ se nur por momento, la ŝteliston. Mi deziris vidi lian vizaĝon, lian staturon; ĉu mi havus ŝancon venki lin? Karulo, mi ne kapablas klarigi, sed mi estis tiel kuraĝa, ke mi preskaŭ ĝuis pro la atendeblaj ekscitoj.

Estis aŭdeble, ke iu ellevas la fenestrovitron fendas la kurtenon, kaj rampas en la fumsalonon, kie troviĝas la monŝranko kaj la skribaĵoj pri la mastrumaj spezoj. Tiam mi jam iris kaŝe en la bibliotekon. Inter ni staris nur unusola pordo. Baldaŭ mi aŭdis kraketon de alumeto, sekve min

inundis ŝvito. Nur tiam mi rimarkis, ke ege mi ekscitiĝis. Bategis mia koro, tremis miaj muskoloj kaj mia buŝo sekiĝis. Mi kuŝiĝis sur la planko kaj scivole observis, ĉu li laboras ĉe lumo? Sub la pordo nenia lumo helis, sed mi aŭdis, ke li ekagis ĉe la ŝtalŝranko.

Do li staras ĉe la monŝranko! Mi silente iris ĝis la pordo. Mi sentis pulsi mian koron en la buŝo, en la oreloj, en mia stomako, sur pintoj de la piedfingroj. Mi preskaŭ ebriiĝis pro mia kuraĝo... poste mi abrupte enpuŝis la pordon.

Du paŝoj... kaj mi staris ĉe la monŝranko, kaj kiel mi antaŭvidis, mi kunpuŝiĝis kun la rabisto. Li eligis bestan krion. Mi sentis, ke tiu ulo terure timiĝis. Li mordis mian dekstran manon, responde mi pugnis lian okulon per mia maldekstra mano kaj komenciĝis nia luktado en la fulge nigra mallumo. Tiu morte timiĝinta homo povis nur mordi, sed mi teren premis lin kaj ĉirkaŭis lin per miaj genuoj tiel, ke liaj ripoj kraketis. Li komencis anhelante sputadi kiel bufo. Kaj kiam mi kaptis lian kapon, li enigis siajn dentojn en mian veston. Sekve mi komencis ambaŭmane premi lian laringon. Kiel ferkrampoj alpremiĝis miaj fingroj sur lian kolon. Senlace, ĉiujn fortojn kolektante mi premis, premadis lin. Mi preskaŭ eksvenis pro la fortostreĉo kaj pro la besteca volupto de la murdemo.

Dum kelka tempo li ankoraŭ skrapis miajn manojn, sed tute senforte. Fine liaj manoj defalis kaj li ek-ekĝemis. Terure! Tri fojojn. Mi ne kalkulis ilin, sed eĉ nun, kvazaŭ mi aŭdus sinsekve tiujn stertorojn. Mi plene regis lian korpon, sed ne kapablis – bone tion komprenu –, mi ne kapablis depreni miajn fingrojn de sur lia kolo. Mi eĉ ne sciis, kiom da tempo pasis tiel. Povis esti unu minuto, povis esti tri horoj. Fine, kaj pri tio mi estas tutcerta, ia terura naŭzo kaj laciĝo anstataŭis mian triumfan senton. Kvazaŭ mi ne havus plu cerbon, kaj mi estus plene idiota, kvazaŭ mi devus sidi tie en la mallumo ĝis la lasta juĝo, por premi tiun damnitan laringon.

Subite mi eksentis, ke la kolo estas rigida kaj malvarma. Mi saltleviĝis kaj rapidis reen en mian dormoĉambron por lumo. Poste, ĉe kandelflamo mi rigardis tiun homon. Li estis Petro, nia pasintjara koĉero. Mallarĝbrusta, kavvanga, nerazita, etliphara kamparano.

Liaj flavaj okuloj pufiĝinte alrigardis min. Lia vizaĝo iĝis violmakula. Li estis morta.

Mi teruriĝis, konsterniĝis, kaj hastege mi komencis revivigi lin. Mi frotadis lin, ŝprucis akvon' sur lian vizaĝon, poste senprudente mi kuradis tienreen. Baldaŭ mi tamen komprenis, kion mi devas fari: mi vokis servistojn. Tiam mi rimarkis, ke niaj tri hundoj morte kuŝas en la korto. Du junulojn mi okupigis pri respirigado, la trian mi sendis por kuracisto. Dum ni tiris-skuadis ĉe kandellumo la senvivajn brakojn de Petro, revenis la servisto sen doktoro, kiu ne estis hejme. Ĝis tagiĝo ni daŭrigis la revivigadon, dum tri horoj, senrezulte. Fine mi devis konstati, ke ĉio vanas, mi murdis homon, mi sufokis la povran, malfortan kamparanon.

Kaj tiam mi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Sur la blendita monŝranko videblis tri fingrojn profunda ĉizita kavo. Surplanke apud la kadavro dise kuŝis la ŝteliloj de la kompatinda Petro. Aĉa fajlilo, martelo, borilo, kies delonge perdiĝintan tenilon iu anstataŭis per kruda ligno, krome misdenta mansegilo. Per tiuj li volis trarompi la blenditan ŝrankon. Li estus devinta labori per ili ĝis la lasta juĝo. Kredu min, kiam mi ekvidis ĉi tiujn ilaĉojn, ĉi tiujn mizerajn infanludilojn apud Petro, kaj rigardis liajn pufiĝintajn okulojn, terura kompato, bedaŭro komencis premi mian gorĝon. Mi preskaŭ laŭte ekploris. Povra, povreta Petro! ... Ke mi atakis per mia tuta forto tiun mizeran, feblan homon, kiun muelis la vivo, laboro kaj malriĉeco, estis terurega honto. Komprenu, tio estis la plej hororiga! Kaj tion jam ne eblis korekti!

(Béla Gecső denove jam preskaŭ ekploris. La rememoro ege ekscitis lin. Mi provis lin konsoli, sed sensukcese. Li silentis kaj jam tute ne aŭskultis. Rigide li elrigardis malproksimen tra la fenestro de la rapidtrajno.)

Tradukis: László Mauksinszky

Korektoj

En n-ro 1/1983 sur la paĝo 11-a („Gustumu la hungaran! ") bedaŭrinde malhelpas la komprenon **kelkaj** preseraroj. Bonvolu korekti.

Kolumno 1-a, vico 16-a de malsupre: anstataŭ *o* kaj *a* devas esti: vokalo inter *o* kaj *a*
Kolumno 1-a, vico 13-a de malsupre: **a** (o) –– **a** (o)
Kolumno 2-a, vico 22-a de malsupre: **10. é** (e') –– **10. é** (e:)
Kolumno 2-a, vico 10-a de malsupre: ág (a'g) –– ág (a:g)

En la sama numero, sur paĝoj 2-3 aperas plurfoje la erara informo, ke la Mondan Komunikan Jaron proklamis UNESKO. Fakte tion faris UN (Unuiĝintaj Nacioj). Ni pardonpetas pro la eraroj.

Szilárd Bálint

Kion diras la dekalogo?

Agnesa kaj Olga estis edziniĝintaj fratinoj. Ilia patrino loĝis en fora parto de la urbo, tial ili nur malofte vizitis ŝin. Post kiam la patrino iĝis vidvino, ŝi laboris multe kaj diligente, ĉar en solo ŝi edukis la du filinojn, kiuj finis gimnazion. Foje amikino grumblis antaŭ la patrino:

– Vi tro multe penadas, kara, mi timas, ke iutage vi ruiniĝos! Sed bone memoru: la filinoj tiam flankenĵetos vin, kiel neuzeblan aĵon! Patrino estas kara nur ĝis kiam de ŝi ili povas iom ricevi...

Sed la patrino ne inklinis ŝanĝi sian modestan, laboreman konduton, kaj daŭre klopodis multe perlabori. La filinoj neniam demandis, ĉu ŝi havas bezonojn, ĉar ili imagis, ke se iu estas maljuna kaj emerita, tiu vivas sen zorgoj kaj ne interesiĝas pri multekostaj distraĵoj. La maloftaj reciprokaj vizitoj eĉ firmigis la surfacan opinion de la fratinoj. Okazis foje, ke Agnesa telefonis al Olga:

– Imagu, onidire nia panjo havas en la ŝparkaso grandan deponaĵon, pli ol ducent mil forintojn! Ni devus ekscii la veron.

– Interese! Tamen min tute ne interesas tio – respondis Olga.

– Nu, ankaŭ min ne... do ni forgesu tiun klaĉon.

Tamen jam la postan tagon Olga vizitis la patrinon kun ĉokolado kaj floroj. Dum babilado Olga ekkuraĝis lanĉi la demandon:

– Ĉu estas vere, ke vi havas grandan sumon en la ŝparkaso?

– Jes... se vi volas scii: ducent mil forintojn. Se mi ne elspezos ĝin, la duono de tiu sumo estos via heredaĵo...

– Sed, kara panjo, ni ja ne bezonas vian monon... elspezu ĝin por vi mem, aĉetu vestojn, vizitu teatrojn, estis ja vi, kiu ŝparis ĝin... Kvankam verdire... mi ne povas nei, ke tiu sumo ĝuste nun trafus nin agrable, ĉar mia edzo volas aĉeti aŭton. Ja ni ege deziras dise veturi tra la lando dum ekskursoj... ni povus facile porti la nepojn al la lernejo...

– Jes, jes, mi povas tion imagi... tamen vi devas atendi dum mi vivas. Eble dume ŝparu la monon por la aŭto...

Pasis kelkaj tagoj, kaj ankaŭ Agnesa vizitis la patrinon kun etaj donacoj. Kiam la konversacio turniĝis al la mono, Agnesa ŝajnigis indiferentecon, tamen baldaŭ ŝi ekrakontis pri la ripozdomo ĉe granda lago, ĝuste nun estas jam tempo fini ĝian konstruadon kaj instaladon, sed necesas pli da mono...

– Antaŭ kelkaj tagoj vizitis min Olga – respondis trankvile la patrino – kaj ŝi konsilis al mi aĉeti belajn vestojn, viziti ĉarmajn lokojn, ĉar il nun ŝparas por aĉeti aŭton. Mi do decidis, ke mi partoprenos grupvojaĝoi al Egiptio kune kun mia kuzo, Johano. Li estas malriĉa homo, do mi pagos ĉion anstataŭ li.

Agnesa ruĝiĝis, sed ne kontraŭis la patrinan planon. Hejme ŝi tuj telefonis al Olga:

– Ĉu vere vin ne interesas la mono de panjo? Vi ja petis de ŝi sumon por aĉeti aŭton!

– Nu jes, mi petis... sed mi ricevis nenion – respondis Olga.

– Tiu stranga plano de panjo, veturi eksterlanden kun oĉjo Johano, kostos almenaŭ sesdek mil forintojn. Ni devas tion malhelpi, ĉu vi konsentas ? Morgaŭ estos dimanĉo, estos konvene, se kun miaj edzo kaj infanoj ni tagmanĝos ĉe vi, tiam eblos detale trakti la aferon...

– Sed... ĉu ne estos pli bone trakti ĝin en via hejmo?

– Tute ne... la muroj de nia domo estas maldikaj, la najbaroj aŭdos ĉion!

Finfine la du familioj interkonsentis, ke ili gastigos la patrinon dum tutmonata restado en arbara pensiono, pagante ŝiajn kostojn. Eĉ kiam la patrino volis akcepti tiun proponon nur kune kun oĉjo Johano, ĉar ŝi eventuale bezonos akompananton pro sia malforteco – la fratinoj sen kontraŭdiro konsentis. Ili jam konis la daton de la Egiptia vojaĝo, ĝuste dum tiu tempo atendis la pensiono la maljunulojn...

Pasis la agrablaj tagoj en la arbaro, kaj la patrino kore dankis la afablecon de siaj filinoj. Kaj aldonis, je ilia ega surprizo:

– Feliĉe, dum tiu arbara ripozo mi ŝparis sufiĉe da mono por aĉeti taŭgan veston por la vojaĝo al Egiptio...

La edzo de Agnesa ekkriis:

– Panjo, ĉu vi vere volas forveturi denove? Ĉu tiu ĉi ripozo ne sufiĉis al vi?

– Sed mia kara, mi jam delonge enpagis la tutan vojaĝkoston por ni ! Pro la arbara ripozo ni devis ŝanĝi niajn biletojn al la sekva grupvojaĝo, kaj bonŝance, tion la vojaĝburoo akceptis. Estu trankvilaj... Johano gardos min, kaj el Kairo ni tuj post la alveno sendos al vi telegramon...

Ambaŭ familioj alvenis malfrue al la flugplaco, ili povis nur salute gesti al la flugmaŝino, kie la patrino kaj Johano ridetante gestis adiaŭante. Post dek minutoj la flugmaŝino komencis ruliĝi sur la betonvojo, sed abrupte haltis. Blanka savaŭto kuris al la flugmaŝino, el ĝi du viroj kun brankardo rapidis sur la ŝtuparo al la malfermita pordo de la flugmaŝino. La filinoj kuris al la deĵorejo, kie jam multaj demandis la oficiston. Li senpove etendis la brakojn:

– Bedaŭrinde, mi scias ankoraŭ nenion... Kiuj havas familianon inter la vojaĝantoj, notu siajn adreson kaj telefonon en tiu ĉi libro, por ke ni informu ilin pri eventuala okazaĵo...

La familianoj de la patrino rapidis hejmen kaj atendis ekscitite apud la telefono. Agnesa kaj Olga sentis rimorson. La edzaj pensoj flugis ĉirkaŭ aŭto kaj ripozdomo...

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la finon de tiu historio, tial ni petas vian helpon. Bonvolu sendi ne pli ol 30-35 tajpitajn (aŭ bele skribitajn) liniojn. La plej bona novelfino akiros libropremion kaj aperos en HV. Povas konkursi ankaŭ tiuj, kiuj jam gajnis foje. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi numero.

Daŭrigo
de la novelo „Mono en la kelo"
aperinta en la n-ro 1982/5. Daŭrigas Silvia **Langer** *el Dresdeno (GDR)*

Klotilda malŝaltis la televidilon vespere, ĉar ili volis priparoli la venontajn „negocojn" per fridujoj kaj lavmaŝinoj. Almenaŭ belajn reklamfotojn ili jam posedis pri tiuj varoj... Pro la ĝisnunaj „triumfoj" ili volis sin gratuli per hejma festeno. Klotilda ekbruligis kandelon kaj iris preni el la kelo vinon.

Gajaj de brakumoj kaj vino ili duonebrie ekdormis noktomeze. Sed baldaŭ sirenhurlado kaj bruego vekis la paron. Klotilda, kiu unue rekonsciiĝis, eksentis brulodoron kaj vidalvide de la kuirejo helan fajrolumon el la kelo. Ambaŭ urĝe kaj apenaŭ vestite forlasis la loĝejon, sed tiam la fajrobrigadistoj jam ligis siajn tubojn. La timo Antonion igis abrupte malebria. Li flustris rapide al Klotilda: „Nia kesto en la kelo! Mi kuras por elpreni ĝin." Li kuris malantaŭ la korton, saltis tra barilo, kaj en la fumon enpaŝante li malsupreniris la kelŝtupojn. Ankoraŭ ne difektita ŝajnis la kaŝejo, do li ekprenis la keston kaj kun granda peno, spirretene li provis supre atingi la elirejon, plurfoje stumblante pro mispaŝoj, sed fine falis teren. La fajrobrigadistoj elportis lin kaj la keston. Venis policisto por ekzameni, kiu elvenis kaj kion li kunportis, ĉu propran aŭ fremdan aĵon? Klotilda rapidis klarigi, ke li estas ŝia „edzo" kaj en la kesto nur la propraj juveloj, kiujn li volis savi el la fajro...

La policisto miris, ke tiel valorajn juvelojn oni gardas en kelo. Ĉar estis klarigenda ankaŭ la brulkaŭzo, nia paro estis ĝentile inivitita al la policejo kune kun la ferkesto. La tutan domon traekzamenantaj fajrobrigadistoj kaj policanoj trovis en la dormoĉambro plurajn perukojn. Suspektinde! – ili diris, tiuj gejunuloj ja tute ne estas kalvaj, nek estas aktoroj! ? En la policejo oni baldaŭ konstatis la similecon de la perukoj, de la koloroj kaj hararanĝoj al la priskriboj de la denuncoj. Anstataŭ juveloj, en la malfermita kesto troviĝis multe da mono: la fripona paro ne havis plu eblecojn por ne konfesi la trompserion. La tribunalo baldaŭ senigis ilin de la mono, favore al la trompitaj personoj, kaj de la libero, favore al la kredema publiko.

JUNA AMIKO ALPAROLAS

Letero de la redaktoro

Kvarmonata internacia lerneja revuo, kiu siatempe kulminis per respektinda eldonkvanto de plurmil ekzempleroj, antaŭ pli ol unu jaro subite eksilentis. La redaktoro, s-ro Géza Kurucz, *eksiĝis post okjara diligenta aktivado kaj la legantoj dum longaj monatoj prave atendis respektivan klarigon.*

Neordinare alta eldonkvanto en la pasintaj jaroj mem konfirmis konstantan bezonon de tiu ĉi unika periodaĵo, kiu per facilaj tekstoj kapablus kontentigi bezonojn de relative vasta kolektivo de novaj lingvo-adeptoj. Ankaŭ ties enhavo estis adekvata kaj la oferto varia – artikoloj pri diversaj landoj kaj regionoj, rakontoj kaj fabeloj, lingvaj ekzercoj, ludoj...

Tial estas nature, ke Hungara Esperanto-Asocio decidis daŭrigi la eldonadon kaj komisiis la subskribinton transpreni la redaktan postenon.

Esence konservante sian karakteron JUNA AMIKO deziras teni amikajn kontaktojn kun la ĝisnunaj legantoj, – eĉ se verŝajne multajn el ili seniluziigis la neregula aperado kaj laste eĉ malapero de la revuo – kaj eĉ gajni novajn legantojn.

Alia unuaranga tasko estas garantii glatan funkciadon de la konstantaj kunlaborantoj. Bedaŭrinde, intertempe jam kelkaj malaktiviĝis. Sekve, ĉiuj kapablaj helpemuloj estas bonvenaj. Kompreneble, kontribuante al JUNA AMIKO oni devas nepre plenumi postulon rilatan al tiu ĉi specifa gazeto, destinita principe por komencantaj esperantistoj. Seriozaj aliĝintoj ricevos tiucele vortoliston, laŭ kies provizo ili povos oportune kompili aŭ modifi la kontribuaĵojn.

Cetere, ni volonte publikigos interesajn sciigojn de lernantoj, korespondanoncojn (pli multe ol ĝis nun), fotografaĵojn (bone reprodukteblajn) el ĉiuj landoj kaj kontinentoj. JUNA AMIKO estu maksimume internacia, ĝi pruvu efike universalecon de niaj lingvo kaj movado. Internacia laŭ sia diverslanda kunlaborantaro, internacieca laŭ sia enhavo. Kaj konsiderante ankaŭ specifajn celojn de la esperantista movado.

Pli ol unujaran vakuon la eldonanto intencas plenigi per kutima pojara dozo, kio samtempe signifas, ke la eldonritmo stabiliĝos nur post certa tempo. De niaj kunlaborantoj multe dependos, ĉu ni sukcesos mallongigi ĉi tiun provizoran periodon. Tamen, ne temas nur pri la estonteco plej proksima. Tiuokaze mi alvokas miajn ŝatatajn kolegojn – furnalistojn kaj verkistojn – esti almenaŭ de tempo al tempo aŭtoroj en JUNA AMIKO. Verki por la junaj lernantoj kaj baldaŭaj movadanoj, kiuj atendas kaj pretendas bonan legaĵon – tio certe indas la penon.

Oldřich Knĭchal
Korespondadreso:
Budaőrs, Patkó u.3. II.19.
H–2040, Hungario

Mirakla mondo de grotoj

Hungario estas lando ne nur de kuregantaj ĉevaloj, senlimaj ebenaĵoj, mildaj montetoj kaj fama gastronomio, sed ankaŭ de pli ol mil grotoj, el kiuj naŭ estas viziteblaj de turistoj. Jam nun ni aldonas, ke oni nepre kunportu varman vestaĵon, ja la averaĝa temperaturo sub la tero estas 9-12 Celsiaj gradoj.

Ni komencu nian grotpromenadon en Transdanubio. IREN (Internacia Renkonto Naturamika) okazas en vilaĝo Abaliget. En la 18a jarcento mueliisto malkovris longan groton, kie nun la vizitanton atendas figuroj de fabeloj: Elefanto, Krono, Neĝulino kaj la sep nanoj, kaj apud ili lirlas la subtera rivereto Stikso. La galerio estas kalkoŝtono el la triasa epoko. La kalciaj ionoj en la aero; la vivaj fungoj, produktantaj antibiotikojn en la grotmuro havas eminentan kuracefikon kontraŭ malsanoj de spirorganoj. En la riveretoj ekzistas pratempaj estaĵoj.

Ripozante ĉe Balatono, oni povas ekskursi al la geologia pasinto. Apud Balatonfüred, sub la monto Tamás, situas groto Lóczy, kiun formis pratempaj termoakvoj, do, la muroj estas tute kalvaj, sen stalaktitoj. Sensuspektaj putfosistoj malkovris en 1902 en urbo Tapolca la lagan groton. Sed la lago bedaŭrinde antaŭ kelka tempo malaperis pro la proksima baŭksitminejo. Parto de la urba hospitalo situas en la groto.

Budapeŝto estas ĉefurbo ankaŭ de grotoj, ja sub la montaro Buda zigzagas 25 km longa grotaro, kiun rezultigis iama granda geologia katastrofo. En la strato Szépvölgyi troviĝas la enirejo de groto Pál-völgyi (Paŭlo-vala), kie estas tre bone observebla la efiko de la pratempaj termakvoj kaj aliaj tektonikaj eventoj. La murojn ornamas kalcitaj kristaloj, fosiliaj konkoj, stalagmitoj kaj stalaktitoj. En la bonakustika Teatra Salono eblas aŭskulti klasikan muzikon. Brilanta „rozĝardeno" de kalcitaj kaj aragonitaj kristaloj ravas la turistojn en la groto Ottokar Kadić sub la monto Szemlőhegy.

Nia sekva elirpunkto estu la dua plej granda hungara urbo: Miskolc ! Montaro Bükk, kie situas la urbo, havas pli ol 300 grotojn. Post kvaronhora veturo per aŭtobuso n-ro 2 ni atingas la unuan subteran banejon de nia lando. La varmeta kuracakvo en Miskolc-Tapolca enhavas hidrokarbonaton kaj radonon. La baseno mem estas 100 kvadratmetrojn granda kaj 1 m profunda. Proksime situas Lillafüred, kie sub la ĝardenoj de hotelo Palota (Palaco) troviĝas la groto Anna kun siaj figuroj el kalkotufo: Norda Lumo, Koro, Plorsaliko ktp. Preskaŭ samloke estas la groto István (Stefano), kiu estas tipe karsta kun belegaj stalagmitoj kaj stalaktitoj. Tra 52 m longa tunelo ni alvenas en la Granda Salono, de kie sur ŝtuparo ni povas suprengrimpi al la „Fabela Lando" kaj „Kupola Salono". Riĉaj stalaktitaĵoj mirigas nin ĝis la „Bastiono" kaj „Teatra Salono". Ankaŭ groto Szeleta troviĝas proksime, kie iam vivis prahomoj.

La unusola subtera natura ŝtatlimo situas inter Hungario kaj Ĉeĥoslovakio, kaj ĝi estas parto de la groto Baradla en Aggtelek. La tuta grotaro estas 25 km longa, el kiu 7 kilometroj apartenas al Ĉeĥoslovakio. Enirinte la galerion ni tuj trovas prahoman loĝlokon „Salono Ostarejo", sur la bordo de subtera rivereto Aĥerono ni iras al la „Koncerta Salono" inter stalaktitoj kaj stalagmitoj. En tiu salono eblas boatadi kaj aŭskulti muzikon. Arbaro de stalagmitoj kaj stalaktitoj atendas nin en la „Kolonhalo", sed nin ravas ankoraŭ la „Tigro-ĉambrego" kaj la pitoreska „Puntohalo". Tiu ĉi ekskurso daŭras ĉirkaŭ 1 horon, same kiel la alia ekskurso el vilaĝo Jósvafő. Ni sub-

Tektonika fendego en groto Pál-völgyi (Budapeŝto). Foto: Péter Vukov



Momentfoto el la longa ekskurso tra la groto Baradla (Aggtelek-Jósvafő). Foto: Vukov





Turismaj grotoj en Hungario:
1. Groto de Abaliget
2. Groto Lóczy
3. Laga groto de Tapolca
4. Groto Pál-völgyi (Paŭlo-vala)
5. Groto Ottokar Kadió
6. Grotbanejo Miskolc-Tapolca
7. Groto Anna
8. Groto István
9. Groto Baradla

teriĝas ĉe la hotelo Tengerszem (Monta Lageto) kaj vizitas la Salonon de Gigantoj, kiu estas la plej granda en Mez-Eŭropo (200 m longa, 40 m alta). Ni povas organizi ankaŭ longan, 5-horan grotan promenadon de Aggtelek ĝis Jósvafő, tra la ĉefa galerio. La turistoj marŝas sur la bordo Stikso, kun manlampoj inter stalaktitoj kaj stalagmitoj ĝis la „Fera pordego"; krom la subteraj montoj, akvofaloj vi povas spekti la plej grandan stalaktiton de Hungario, kiu estas 25 m alta.

Se vi volas organizi (eble grupan) ekskurson al la grotoj, vi kontaktu la koncernan departementan turisman oficejon, kaze de Budapeŝto la Nacian Medio- kaj Naturprotektan Oficejon.

Péter *Vukov*

Mihály Dumitrás (1906–1983)

Venis la informo, ke li forpasis. La 20-an de januaro 1983 forpasis Mihály *Dumitrás* (miha:j dumitra:ŝ), kiun ni ĉiuj ame estimis pro lia engaĝiteco al nia movado, pro lia senkondiĉa sindediĉo al ĉiuj bonaj aferoj. La perdo unuaminute ŝokis nin, sed pri la vakuo restinta post li, ni konscios nur poste. Li pasigis sian tutan vivon per obstina, bonvola servo al la homo. Ni funebras humaniston – la malhumanismo de la morto drastas multe pli ol en ceteraj kazoj. Nia Oĉjo Miŝka ne plu ekzistas. Finiĝis homa sorto destinita por la komunumo, por la ideo de esperantismo, por la altaj idealoj de la laborista movado. Sepdek sep jaroj atestas en nia memoro pri li, pri la filo de urborando de Orosháza, kiu devis forlasi la bazan lernejon por fariĝi etpaŝtisto kaj perlabori la necesan pan-pecon. Poste bienservisto, radfarista metilernanto li estis. Tiutempe li dediĉis sian vivon al Esperanto, kaj li restis fidela al nia movado eĉ en la plej malhomaj epokoj, vane lin persekutis ĝendarmoj, vane lin akuzis armea tribunalo – eĉ la prizono ne rompis lian konvinkiĝon. Post la liberiĝo de la lando li estis elektita urbesto de Orosháza, prezidanto de la distrikta konsilantaro, altrangulo en la partio. Li, plenumante eĉ la plej altajn postenojn, ne forgesis Esperanton, dum longaj jardekoj kiel prezidanto de la teritoria kaj departementa Esperanto-komitato li laboris por la prospero plenkore, tutanime, utiligante siajn altajn kontaktojn por Esperanto. Kvankam altrangulo, li neniam forgesis la urborandan vivon, li batalis ĉiam por la interesoj de la simplaj homoj, li luktis kontraŭ la nekomprenema lignokapeco.

Venis la informo, ke li forpasis. Ĉu estas inter ni, esperantistoj iuj, kiuj ne memorus pri iu lia helpo. Li forpasis, kaj nun per enorma forto evidentiĝas, ke li vivis modele, home kaj imitinde por ni ĉiuj.

I. Sz.

Gábor Garai
(1929–)

Mihály Dumitrás

Sepdek sep jarojn vivis li luktante,
meritus lia unusola paŝ'
honoran tombon, tamen urborande
ripozi volis Mihály Dumitrás.

Lin naskis suba rand' de Orosháza,
tien sopiris li post vivokraŝ',
post luktoj strečaj, sorto homfrakasa
perdinte fortojn Mihály Dumitrás.

La famili' ministron, estrojn donis;
ankaŭ li estris, kaj sen arbitraĵ'
fiere servis kaj obstine bonis,
urbrande servis Mihály Dumitrás.

Če l' urborando ŝtormoj ekfermentas
kaj ekripozas post puriga draŝ';
sub kalvaj arboj tie vin atendas
ripozo fina, Mihály Dumitrás.

Tradukis: Imre Szabó

GAJA PAĜO

Hunda afero

– Vi estas la plej malsaĝa hundo iam ajn videbla! – koleras ĝia mastro ekscitite. – Mi petis vin alporti la gazeton, sed anstataŭ tio vi komencis kafon kuiri!

Senhunda afero...

Grumblis la policisto kolere, ekzamenante rompŝtelon en vilao.
– Kie vi estis dum tiu nokto, kiam okazis tiu ĉi ŝtelo? – li turnis sin al proksime loĝanto.
– Mi povas pruvi per kvar fidindaj atestantoj, ke tiunokte mi en alia loko partoprenis rompŝtelon.

Hunda mord'

– Sinjoro! Via hundo ĵus mordis min!
– Vi povas ĝoji! Nur tiun ĝi mordas, kiun ĝi ŝatas!

Moderna ŝafo

– Ne lasu lin amindumi al vi – diris la gardhundo al la ŝafino forpelante la ameman virŝafon.
– Kial ne? – miris la patriniĝema ŝafino.
– Onidire lia lano estas miksita per arta lanaĵo...

Inventemaj ŝtelistoj

Skandalo en la tramo: la monujo de iu virino estis ĵus ŝtelita. Pasaĝeroj kaptas du suspektindajn ulojn, kiuj aroge rifuzas la akuzojn:
– Mi estas tiel senkulpa, kiel ĵusnaskita ŝafido! – krias la unua.
– Kaj mi eĉ tiel senkulpa, kiel morgaŭnaskota ŝafido! – impetas la alia.

Ni revenu al la ĉefa ĉeftemo...

– Terure! Mi aŭdas reveni mian edzon! Vestu vin urĝe!
– Sed kial do? Laŭ la persona komputilo la probablo de lia surpriza reveno estis sub 0,01 procento...



Unue mi konsultu la komputilon pri la ŝancoj de fiasko!

Kaŭzo de divorco

– Kial vi volas divorci, sinjorino?
– Mi ne povas toleri, ke mi restu edzino de kokrita edzo...

Kaŭzo de maldivorco

– Mia parulino estas jam netolerebla! Ŝi senĉese kverelas...
– Kial vi ne eksedziĝas?
– Neeble. Eĉ ni ne geedziĝis ankoraŭ...

Paraleloj se amas unu la alian

– Do mia kara Paralelo, ni renkontiĝos en la infinito!
– Bone, mia kara Paralela, sed ne venu malfrue!

Vespera televidado

– Ĉu vi sukcesis kapti la najbarlandan tv-stacion vespere? Ege distra estis ilia filmo, LA KISO.
– Nu, mi pli facile kaptis la najbaran sinjorinon por la kiso.

Deklaro de tv-riparisto

– Mi volonte riparos la televidilon, sed neniu povas min devigi ankaŭ rigardi ĝin.

Krizo-kvizo

– Ĉu morgaŭ aŭ postmorgaŭ altiĝos la prezo de tiu varo?

E.F.

Kiam ni estis sur la naturisma plaĝo, vi ŝajnis malpli hontema...

KAFMUELILO KUN FIKSILO DE SAKETO

Aplikebla

La kafmuelilo servas antaŭ ĉio la rapidan memservadon de la aĉetantoj. Ĝin povas uzi supermerkatoj, memservaj nutraĵvendejoj kaj pli grandaj restoracioj, en kiuj oni ne bezonas porciigi la muelitan kafon.

Teknika priskribo

La maŝinujo, la supra parto kaj la muelujo estas faritaj el alojita aluminio, la ceteraj partoj, kontaktiĝantaj kun la kafo, el nerustiĝanta ŝtalo aŭ plasto. La materialo de la mueldiskoj estas hardita rapidŝtalo.

La eksteraj surfacoj estas poluritaj aŭ oksiditaj.

Kafmueliloj kun fiksilo de saketo estas produktataj en tri tipoj:

kun kapacito 15 kg/h	kun kapacito 25 kg/h	kun kapacito 40 kg/h
KÖ-15-ZE	KÖ-25-Z	KÖ-40-Z

Teknika priskribo			
Longo:	235 mm	235 mm	235 mm
Larĝo:	185 mm	185 mm	185 mm
Alto:	665 mm	645 mm	660 mm
Elektraj indikoj:	0,37 kW 50 Hz, 220 V	0,55 kW 50 Hz, 380 V	0,75 kW 50 Hz, 380 V
Rotacinumero:	1420/min	1420/min	1420/min
Tipo de la elektra motoro:	motoro OZ 31/4-r	motoro EWG 80/r4	motoro EWG 80/44
Nominala kurentbezono:	550 W	600 W	850 W
Kapacito:	15 kg/h	25 kg/h	40 kg/h
Pezo de la maŝino:	17,5 kp	16 kp	17 kp

KERIPAR

Por prepari bonan kafon, unue necesas taŭge mueli kafgrajnojn. KERIPAR produktas plurajn tipojn de kafmueliloj — ĉiu el ili estas ne malhavebla en la propra aplikosfero.

Eksportanto: TRANSELEKTRO

Leterkesto

Ernst Diedrich, Warin, GDR: Ni esperas, ke pere de la Berlina hungara librovendejo via klubo jam akiris la 10 ekzemplerojn de „La Verda Koro" de Julio Baghy. Prave vi karakterizas ĝin kiel interesa kaj bonega lernolibro-romaneto. Pri via sugesto (ne la unua) pri internacia eldonejo ni atentigas vin, ke tiaspecaj entreprenoj ne estas facile kreeblaj aferoj, i.a. pro malfacile solveblaj problemoj de centra redaktado, kapitalo, valutaj-devizaj komplikaĵoj. Bonaj intencoj tute ne sufiĉas... Internaciaj ĵurnaloj certagrade ekzistas, ekz. *Budapeŝta Informilo* plenumas ankaŭ tiun (bultenan) rolon. Kutime ne mankas pri la supraj la internaciaj diskutoj. Cetere, por diri nian opinion: ne ili faras la plejajn zorgojn por la E-movado, samtiel ne la plua scienca planado de nia lingvo, kvankam en tiel multfaceta movado kiel la nia, ankaŭ ili posedas sian lokon.

Je *„Ibis redibis"* – moto, el Budapeŝto, H: Ni akceptas vian anoniman riproĉon pri la daŭrigo de la *„Ĉiutaga historio"* (n-ro 1982/5) – parte! Laŭkutima daŭrigo de la novelaj komplikaĵoj ĝi certe ne estis. Tamen aperis ne ia blindteksto, malgraŭ la nin surpriza fakto, ke taŭga „fabelo" pri sekva vivo de Eva kaj Zoli vere ne alvenis de niaj legantoj-konkursantoj. Ni bedaŭras, se nia elekto koncerne la publikitan daŭrigon ne trovis vian plaĉon (eble ankaŭ ne de aliaj), tamen konsideru ĝin kiel spritan olvon de la „banala ĉiutagaĵo", do kiel trafan trovon pri nia vivo driva...

Leon Zimels, Ternopol, SU: Kun intereso ni legis viajn rememorojn pri la 21a UK, okazinta en Budapeŝto antaŭ preskaŭ duonjarcento – en 1929. Kaj tiutempe, kaj nun – en via alparolo al la artikolo de Corsetti–La Torre – jam kun grandaj spertoj de veterano vi argumentis celtrafe. Akceptu niajn dankojn.

Andres Aruoja, Kehra, SU-Estonio: Ni konsentas, ke ŝercoj, naskiĝintaj en iu lando, tre ofte ne trovas rideman publikon en aliaj landoj – kaj des malpli ili uzeblas por internacia publiko. Tio estas konata malfacilaĵo antaŭ humuristoj, ja ĝuste tiu literatura ĝenro radikas plej profunde en la loka grundo. Se transplanti ilin aliloken, manifestiĝas la diferencoj de la humurklimatoj. Rezultas jen nekompreno de la kaŝita humuro, jen neapero de ridemo flanke de la legantoj, kies humur-bezono eventuale kontentiĝas per alispeca ŝercado. Eble la malplej internacieca literaturo estas tiu de la ŝercoj kaj satiroj. Ni serĉu do daŭre la vojon ireblan, sed laŭeble ne per tradukado.

Vladimir Bespalov, Soĉi, SU: Plezure ni eksciis, ke en via klubo „Laro" multaj membroj abonas nian revuon, kaj ĝiaj artikoloj (recenzoj kaj studoj) estas ŝatataj temoj de diskutoj. – La libroj de HEA estas mendeblaj laŭ konataj manieroj, eĉ pri „Timur kaj lia taĉmento" de *Gajdar – Perevertajlo,* vi ne bezonas apartan katalognumeron, la titolo sufiĉas sur la mendilo. – Vi bone rimarkis sur la foto, la surscenigon de *J. Elem:* Ĉu vi vidis jam la piedsignojn de la profeto? partoprenis ankaŭ Rikardo, filo de Jozefo *Horváth,* aŭtoro de sukcesa (hungara) lernolibro: „Esperanto dum 30 tagoj". Ni dankas viajn rimarkojn kaj konsentojn pri HV, kiujn ni atendos ankaŭ alifoje.

Jozefo Németh, H: La supra respondo al nia estona leganto koncernas ankaŭ viajn klopodojn. Bonvolu informi nin pri via adreso, ne trovebla sur la manuskripto, kiun ni atente legis.

Franz Schick, Leoben, A: La kunveno por memori la veteranojn de IPE (Internacio de Proleta Esperantistaro) okazos – laŭ informo de la organizantoj – en Budapeŝto (Tábornok u. 11/b), 6. aŭgusto je horo 15. Oni atendas viglan interparoladon, ankaŭ vian ĉeeston, do – ĝis revido!

Esperantista radioamatora-rondo

Laŭ la konsento de MRASZ (Hungara Radioamator-Asocio) kaj rezulte de celkonscia, persista preparlaboro de du entuziasmaj fervojistaj esperantistaj radioamatoroj – laŭnome Lajos *Kapitány* (Dunakeszi) kaj D-ro Imre *Ferenczy* (Győr) – estas fondita la Esperanto Rondo de la supre menciita asocio. Tio okazis en Budapeŝto la 15-an de januaro ĉj., kun la financa apogo de Fervojista Faksekcio de HEA. La membraro de tiu Esperanto-Rondo loĝas kaj laboras en diversaj urboj de Hungario. Partoprenintoj de la fondiga kunsido – momente 16 radioamatoroj (laŭ internacia indiko HAM) elektis kvarmembran estraron de la Rondo, ili estas: D-ro Imre *Ferenczy* HG1UD prezidanto, Ernó *Pataky* HA5PX vicprezidanto, Gáspár *Hevér* HA8UX sekretario kaj Lajos *Kapitány* OP HA7KSV afergvidanto-sekretario.

Membroj de la Rondo estas: HA9RI, HA8BS, OP HAØKHA, OP HA8KCS, OP HA5KJX, OP HA8KCS (István), HAØKJ, HA3RK, HA7PW, OP HA6KNX, OP HA5KKO kaj F-ino Erika *Bardócz,* kasisto.

Laŭ la decido de UN (Unuiĝintaj Nacioj) la jaro '83 estas deklarita *„Monda Komunika Jaro"*, konsekvence la membroj de la Rondo aktivos en la etero pli kaj pli intensive, eĉ ili strebos varbi novajn adeptojn por la tendaro de hungaraj esperantistaj radio-amatoroj.

Tiu fakto, ke la 68-a Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉj. en Budapeŝto, aktualigos la mobiliziĝon de la esperantistoj HAM, ĉar eble ankaŭ dum la 68-a UK funkcios kurtonda radiostacio, kaj tio ebligos por multaj diversnaciaj HAM estigi interkontaktojn (QSO) kaj interamikiĝon.



Obstino

En la ĉefaj linioj de nia enigmo (H.1. kaj V.22.) ni citas la lastajn du versojn el poemo de Rejna de Jong (ensendendaj linioj).
Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **12.** Nedifinita persono **13.** En neniu ajn loko **14.** En nedifinita tempo **15.** Reen: interjekcio **16.** Aera koboldo (R) **18.** Finiĝanta per akuta kaj pika ekstremo **20.** Guto de ploro **22.** Insekto kaŭzanta skabion (R) **24.** La duan tagon de semajno **26.** Aro da sportludantoj aŭ kunlaborantoj (R) **27.** Purigi ejon **29.** Rondon **31.** Numeralo **32.** Identaj konsonantoj **34.** Amaj liptuŝoj **35.** Kiomo de tempo ekde naskiĝo (R) **36.** Komenco de nodo (!) **37.** Kovri per valormetalo (R) **39.** ATT **40.** Muzika ritma melodio (R) **41.** Kuracisto de mensaj malsanoj (R) **43.** Kudrilego uzata de ledlaboristoj (R) **44.** Amata persono **46.** Rumana mono **47.** Ekzistos **48.** Antaŭtrunko **49.** Ligna ujo eltirebla el ŝranko aŭ tablo **51.** Mallongigo de scienca titolo **52.** Konsonantoj de danĝera kuracilo **53.** Duklapa manĝebla molusko (R) **54.** Identaj konsonantoj **55.** Reen: tabelvorto **56.** Fortikigita konstruaĵo (R) **58.** Duono de tago (!) **59.** Kiel H14. **60.** Duvorta alparolo **61.** Enigmon... **64.** Efektive ekzistanta (R) **66.** Forte tuŝi la animon (R) **68.** Kiaspecan? **69.** Venena kemia elemento (R) **71.** Fordonaco de io multvalora **73.** Genro de papago (R) **74.** Plezure kontraŭstarus **76.** Virina nomo **78.** Verba finaĵo.

Vertikale: **1.** Demandvorto **2.** Ŝprucas lafon **3.** Nekonata nomo **4.** Militista ĉapo kun viziero (R) **5.** Psiko (R) **6.** Montri atakemon (R) **7.** Scienco pri versaj metroj (R) **8.** Persona pronomo **9.** Natria klorido (R) **10.** Pluralo de H.44. **11.** Hejma **17.** Rapide, nevole malleviĝu **19.** Parto de Mediteranea Maro **21.** Sekrecianta urinon (R) **23.** Duono de kara (!) **25.** Nekutima (R) **28.** Kemia elemento 39-a **30.** Konsulti la sorton **33.** Teksaĵo (R) **35.** Ter-spaco **37.** Ero de skeleto **38.** Milono de pezunuo **40.** Vertikalo **41.** Ĉiutaga manĝaĵo **42.** Spirebla gaso (R) **43.** Stelo (R) **45.** Senti impreson de surprizo **47.** Ekzistas **49.** Verspiedo (R) **50.** Radiko de V.47. **52.** Sekvas la unuan **54.** Estanta en germana regiono (lando) **56.** Eta infano **57.** Signo de venko **59.** Poseda pronomo **60.** Fortika, solida (R) **61.** (L)a mens' (en la kranio) **63.** Numeralo **65.** Skrapi grundon **67.** Paŝis **70.** Posta parto de kolo (R) **72.** Mallongigo de monato **75.** Komenco de salto (!) **77.** Kiel H.55.

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1982/6: Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas! – Ju pli oni posedas, des pli oni avidas.
Libropremion gajnis per lotumado: Jan *Kafka,* Klašterec n.O., CS: Abromas *Laimundas,* Pilis, SU-Litovio; Gracia *Rondenhuis-Boll,* Aerdenhout, NL.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto:

Georgi Mihalkov

El la „Verda Biblio"
de Izrael Lejzerowicz

Unu el la plej bonaj satiraj verkoj en la originala Esperanto-literaturo estas la „Verda Biblio". El la eksterordinara amuza satiro de Lejzerowicz oni povas ankaŭ multe ekscii pri la historio de la Esperanto-movado.

1. Kion diris La Sinjoro al Diofilo Kara?
2. El kiu lando ekiris Andreo Apud?
3. Kiu diris la vortojn:
   „Sinjoro! Sinjoro!
   Kiel Streĉita Kordo estas mia koro
   Kaj mi estas trista."

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1982/6:
1. Palva laboras en la albuminfabriko n-ro 112; 2. Pygmalion estis reĝo de insulo Cyprus; 3. La heroo de la rakonto „Du maksimoj" oferis tage 2 horojn al la amo, kaj 6-8 horojn al la lernado.

Libropremion gajnis: Norbert *Bludau,* Bochum, FRG; Halina *Piec,* Lublin, PL. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1982/5:
1. Ĉiu plenumu sian devon! – skribis Boka, la prezidanto, fine de la manifesto; 2. Nemecsek plendis, ke sole li restis infanteriano...; 3. Tajloro estis la patro de Nemecsek.
Libropremion gajnis: *Kőszegi* Jenő, Dunaújváros, H; Adolf *Stanura,* Havifov, CS.

Korespondi deziras

F-ino *Watanabe akiko* (20) studentino pri div. temoj. C/o Mishikawa, 1-7-22 Yoshiĝima higashi, Naka-ku, *Hiroŝima,* J–733. – S-ro *Fufitomi takaŝi* (22) studento, div. temoj, kun francoj k.a. C/o Ŝiraiŝi-apart. 3-1-16 Uĵinaniŝi, Minami-ku, *Hiroŝima,* J–734. – S-ro *Mukunoki hiroŝi* (22) ktm, pri div. temoj kun gestudentoj. Funairisaiuai-ĉo, 20-16, Naka-ku, *Hiroŝima,* J–733. – S-ro *Motomura tomojuki* (21) studento, ktm, pri kulturo k.a. C/o Matumoto, 5-11-6 Kurokami, *Kumamoto,* J–860. – F-ino *Uemura fumiko* (19) studentino, ktm, pri div. temoj. 32 Ŭabu Niŝigooŝi-maĉi, Kikuĉi-gun, *Kumamoto,* J–861-11. – S-ro *Tazawa sysaku* (19) studento kun junulino en tm. C/o Murakami, 2-32-21-Aojama, *Sendai-ŝi,* J–982. – S-ro *Dvoran* Ladislac, kun s-anoj el H, F, G kaj Aŭstrio. Str. Kháj̨ence 675/A, *Sezimovo Usti* CS–39 102. – Inĝ. *Vlček* Miloŝ (56) ktm pĉt. certe resp. tuj. Nám. Svornosti 5, *Brno,* CS–616 00. – Ges-roj Agnes kaj Maciej *Baransky* (21) kun gejunuloj en tm, int. fremdlingvoj, literaturo, muziko, filmo, ankaŭ german- kaj ruslingve. Ul. Przyygrodzie 17, *Jaroslaw,* PL–37-500. – S-ro Dariusz *Baranski* (17) lernanto ktm, Ul. Sloneczna 3A/77, *Jaroslaw,* PL–37-500. – S-ro *Szőcs* Imre kaj aliaj junuloj kun najbarlandanoj, ankaŭ por lerni tiamaniere Eon. *Miercurea-Ciuc,* str. Scurtá 29. Cám. Nefam. I.T.M.C. R–4100. – S-ino Linda *Arukaev* (58) pensiulo ktm, pĉt precipe pri naturo, kol. bk, por trovi leteramikinon, certe resp. *Pajusti sjk* (Rakvere) Estonio, SU–202.130. – S-ino Ludmila *Dudina* ktm pri sporto, mod. muziko k.a. resp. certe. *Joŝkar-Ola,* K. Libknehf-str. 60-18. SU–424035. – *Divakova* Tatjana (22) stud. ĵurnalistino, pri fotado, kinoarto, pupteatro, sporto, kulinaraĵoj, lingvoj F, G. *Moskva* Telegraf do vostreb. SU–103009. – *Dobilianskas* Juozas (37) instruisto kun amikoj el soc. landoj pri div. temoj. *Nilkaniškis,* Lanko 44-49. Litovio SU–234-270. – Roland *Skawinski* (41) kooperativisto pri E-literaturo k aktivado ktm. *Varsovio,* Skrytka 288, PL–00-950. – Kazimierz *Lad* (33) fraŭlo ktm pri muziko, turismo, interŝ. pm, bk, modrevuoj, disko, magn.kaseto ktp. *Wroclaw,* str. Trzemeska 6/85. PL–53-679. – S-ro *Kulikov* V.V. emerito ktm pri goo, resp. certa. *Omsk* Lukaŝeviča 23-178. SU–644-112. – Gintaras *Žiaunys* (28) fraŭlo, ktm, pĉt, interŝ. pm, bk, disko, resp. certa. *Mažeikiai* Žemaitijos 9-25, Litovio, SU–235500. – F-ino Marina *Korotj* (22) stud. de muzikkonservatorio, pianisto, pri folklora, ĵaz-muzikoj, E-kantoj, E-instruado, muzikedukado de infanoj, popolaj blovmuzikiloj. *Lvov* ab. ja. 1697, SU–290.035. – S-ro *Turks* Egils (26) fraŭlo, ktm, pĉt. *Riga,* Viestura pr. 35-36. Latvio, SU–226.005. – Studento Grzegorz *Sarnecki* (25) komencanto pri montarturismo, velado, medioprotekto, pejzaĝfotoj, kurtonda radio, kol. bk. *Kamienna Góra* ul. Słowackiego 58/9. PL–58-400. – *Suslova* Olga (16) lernanto, pĉt, *Ĉaadajevka,* ul. Lenina 4, SU–442315. – *Sumina* Rita studentino, pĉt. *Penza,* ul. Krònŝtadtskaja d.3.kv.10. SU–440045. – *Tjurljupin* Andreo (18) studento, pĉt. *Kujbiŝev,* ul. Korosteljovih d.58, kv. 1. SU–443020. – Zdzislaw *Wierzbicki* (30) juristo, ktm pri literaturo, muziko, sporto, turismo, teatro k.s. Interŝ. pm, bk, disko, mang.kaseto. *Wroclaw* ul. Pabianicka 23/3. PL–53-339. – Abituriento *Čibanov* Aleksandr pri historio, lingvistiko, interŝ. muziknotojn (bojano, gitaro), bk, resp.certa. *Bol. Muraŝkino,* ul. Svobody 126. SU–606.330. – F-ino *Soroker* Zilija (26) bibliotekistino, pri literaturo, urboj, arto. *Kujbiŝev,* ul. Taskentskaja d.98. kv.17. SU–443.068. – E-Klubo ERO serĉas amikojn en tm, kor. pri vivo, socio, hobioj k.a. *Ŝaripovo* a/ja 27, SU–662.320. – S-ro *Akulov* Igor (23) pri kemio, kinoarto, muziko, filatelio. *Moskvo,* do vostreb. SU–117.437. – S-ro *Lisanov* Sergej (21) studento, pri lingvoj, poezio, sporto. *Moskvo,* ul. Vavilova d.37a. kv.4. SU–117.312. – F-ino *Morita yuriko* (20) stud. kun virinoj 20-30 j, francoj, svisoj k.a. pri div. temoj. C/o Kokusaigo Kyoiku Kyogikai, Dai 2, Kitazawa-so 1-7-7, Matsubara Setagaya-ku, *Tokio* J–156. – F-ino *Waranabe masako* (20) stud. kun virinoj 20-30 j. germanoj k.a. C/o Tsuboi, 2-12-8 Nishisugamo, Toŝimaku, *Tokio,* J–170. – F-ino *Gonda mitsue* (19) stud. kun gejunuloj el Anglio, k.a. pri rokkmuziko, 1-18-5 Mukoogima, Sumida-ku, *Tokio,* J–131. – S-ro *Hasegawa hirohide* (33) laboristo, pri div. temoj (Rudolf Steiner) kun germanoj k.a. 2-509, 3-30 Haginaka, Oota-ku, *Tokio,* J–114. – S-ro *Horio taro* (64) pensiulo, ktm pri kulturo, religio, vivado, kutimoj, interŝ. bildlibron. 4-528 Venoshiba, Sakai, *Oosaka-fu,* J–545. – S-ro *Himeda isamu* (64) pensiulo, pri div. temoj kun hungaroj k.a. 2-3-6 Hanna-cho, Abeno-ku, *Oosaka,* J-545. – F-ino *Kikkawa hiromi* (23) oficistino, kun gejunuloj pri ĉiutaga vivo, k.a. 307 Nakasu Corp. 107 Nakasu, Yasufuruichi-cho, Asaminami-ku, *Hiroŝima,* J–731-01. – S-ro *Harima ikkei* (34) instruisto, pri div. temoj, kun Belgio k.a. 5-10-10 Abenosuji, Abeno-ku, *Oosaka,* J–545. – S-ro *Tanaka akira* (33) inĝeniero, kun viroj tm. 1-8-10 Nakasakurazuka, Toyonaka-shi, *Oosaka,* J–560. – S-ro *Izuwa yuji* (19) studento, kun junulinoj ktm, pri ĉt. C/o Oka haitsu 1467-1 Ooza-hirai, *Yamaguchi-shi,* J–753. – F-ino *Kaŭagoe maĉiko* (19) stud. kun hungaroj, francoj, hispanoj k.a. pĉt. C/o Kunitomo, 13 Idogaĵari-ĉo, Uzumasa, Ukyo-ku, *Kioto,* J–616. – S-ro *Araki atsushi* (22) stud. kun hungaroj, francoj k.a. pĉt. C/o Mitsuoka, 23 Suiŝa-ĉo Kamitakano Sakyo-ku, *Kioto* J–606.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfons Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: **Tibor Vaskó.** + **Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**

Szabadság MGTSZ Nyomda, Gyál — 83-297

- Mészáros–Nádasdy: Pli sekure kaj ekonomie per Lada 24,– Ft
- Varga: Poŝlibro de kamionmuntisnoj 85,– Ft
- Cseh: Poŝlibro pri funkciigo de motorveturiloj 51,– Ft
- Mészáros–Nádasdy: Pli sekure kaj ekonomie per Trabant 23,– Ft
- D-ro Buna: Malpliigo de la trafikbruo 36,– Ft
- Frankl–Hüttl: Kiel Plu? Dacia 1300 52,– Ft
- Mészáros–Nádasdy: Pli sekure kaj ekonomie per Škoda 23,– Ft
- Pollák: Riparado de aŭtokaroserioj 30,– Ft
- Moinárné–Nagy: Polurado de motorveturiloj 39,– Ft
- Almássy: Lertajoĵ en stirado

La supraj libroj estas mendeblaj aŭ aĉeteblaj en Budapeŝto en Műszaki Könyváruház (Budapest V., Liszt Ferenc tér 9.) kaj en Technika Könyvesbolt (Budapest XI., Bartók Béla út 15.), en provinco en la vendejoj de la Librokomerca Entrepreno „Klera Popolo"

(-7. julia 1983

70 jaroj je la servo dejla tekniko de kommunikado